

# BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO



En la numero:

LA NOVA  
STARTO

•

JUBILEA  
BILANCO

•

INTER-  
LINGVISTIKO  
KAJ

ESPERANTOLOGIO

•

TEJO/BEA-  
SEMINARIO

•

PRI LA NECESO  
PAROLI  
ESPERANTON


•

NI RECENZAS

•

MUZIKO

Feliĉan Novan Jaron!



JARO 56 • N-RO 12 • DECEMBRO • 87

# La nova starto

En 1988 nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ eniras la duan jarcenton de la Internacia Lingvo.

Antaŭ la redakciaĵoj staras gravaj, respondecaj taskoj: ili devas respeguli kiel eble pli sperte kaj ĝustatempe eventojn kaj problemojn de la nacia kaj monda Esperanto-movado.

Pri iuj ĉefaj starpunktoj de niaj estontaj celoj kaj agado ni donas ĉi-sube lokon al eldiroj de elstaraj agantoj de la tutmonda Esperanto-movado.

## TRI CELOJ POR KOMENCI LA DUAN JARCENTON

**HUMPHREY TONKIN (USONO), prezidanto de UEA:**

... Se oni metas la modernajn kaj aktualajn demandojn, kiujn ni nun frontas, apud la ideoj de Zamenhof de antaŭ cent jaroj, oni vidas, unue, ke liaj ideoj restas freŝaj kaj aplikeblaj, kaj due, ke ili eĉ donas la bazon de konstruebla laborplano por la komenco de la dua jarcento de nia lingvo. Ĝin oni povas fokusigi je tri ĉefaj demandoj: instruado de la lingvo, utiligo de la lingvo, ĝeneraligo de la lingvo.

La instruado de la lingvo estas esenca antaŭkondiĉo de floranta Esperanto-movado. Tio devus esti tiel memevidenta, ke ne necesus eĉ eldiri ĝin — sed la realo estas, ke ni ne sufiĉe utiligas nian komunikreton, niajn organizaĵojn, niajn kongresojn, niajn eldonaĵojn, por la baza tasko de instruado. Esperanto-movado ne povas ekzisti sen esperantistoj: estas nia tasko krei ilin.

Post instruado, venas utiligo de la lingvo: por ligi nin pli bone en komuna agado, por streĉi kaj fortigi la lingvon mem, por entuziasmi niajn anojn kaj konvinki ilin pli forte kaj aktive subteni kaj partopreni la agadon. Ni devas elpaŝi nian troan eŭropismon, venki niajn internajn diferencojn; per utiligo ĝui la lingvon de Zamenhof kaj uzi ĝin por ĝiaj intencitaj celoj.

Fine, ni devas labori por la ĝeneraligo de la lingvo utiligante la Jubileon kaj la Unesko-rezolucion, la modernan teknikon kaj ĉiujn aliajn eblajn rimedojn por atentigi la mondon pri la rimarkinda fenomeno Esperanto. Se ni volas bone labori por tiu disvastigo, ni devas pli bone plani nian strategion, realigi niajn taktojn.

Kaj en ĉio ĉi ni memoru tion, kion oni menciis, pri la fideleco de niaj membroj. Ni ne tro misuzu tiun fidelecon, sed respektu ĝin, samtempe respektante unu la alian, kaj respektante la motivojn de niaj kunlaborantoj. Zamenhof revis pri mondo de homaranoj — unuopuloj, kiuj estas samtempe parto de kolektivo. La esperantismo estas ligo inter niaj unuopaj esperoj kaj tiu kolektiva volo.

## LA UNUECO DE ESPERANTO: ESENCA ROLO DE LA AKADEMIO

**ANDRÉ ALBAULT (Francio):**

La rolo de la Akademio de Esperanto estas difinita

en la unua artikolo de ĝia statuto per formulo sufiĉe ĝenerala: *konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon*. Sed tiuj fundamentaj principoj nenie estas konkrete troveblaj: tasko de esperantologoj estas serĉi, studi kaj difini ilin. „Kontroli la evoluon“ estu komprenata kiel „konstati“ kaj „esti preta agi“, se io ne ŝajnas en ordo.

Sed, se funde esplori la aferon, oni alvenas antaŭ jena demando: „kiu estas grava kaj esenca?“ Mia respondo estas: „Ja la unueco de la lingvo!“ Defendi la fundamentajn principojn de la lingvo aŭ pli konkrete la Fundamenton estas finfine nur rimedo por teni tiun unuecon.

La Akademio ne sendos ĝendarmojn al la ne-obeanjoj: ĝi ne havas ĝendarmojn. Ĝi ankaŭ ne uzos inkviziciajn metodojn por trudi siajn decidojn: ĝi ne ŝatas tiajn metodojn! Sed ĉiu lojala esperantisto, asocio aŭ institucio mem obeos tiujn decidojn. Finfine kaj esence, en kiu ajn lingva afero tute ne gravas, ĉu oni sekvu la vojon n-ro 1 aŭ la vojon n-ro 2! Gravus nur, ke ni ĉiuj sekvu la saman vojon. Nur tiel eblas konservi la unuecon.

## INFORMI LAŬ NIAJ EBLOJ

**MARJORIE BOUTON (Britio):**

Dum ni esperantistoj foje blufas per troigoj, unu el niaj propraj eraroj estas, subtaksi niajn realajn jamajn atingojn. Ni ofte tre subtakas nian vortostokon kaj esprimrimedojn, ĉar ni ne sufiĉe observis kaj esploris ilin; ne komprenas, kiel vasta, rilate al nur cent jaroj kaj apartaj malhelpoj, estas nia literaturo; ne konstatas kiel eksterordinara estas la Delegita Reto, aŭ la alia granda reto, neoficiala, sen statistiko, de privataj plumamikecoj kaj praktikaj interŝanĝoj tra la mondo; ne rimarkas, kiom da internaciaj peresperantaj aranĝoj okazas ĉiujare krom la Universala Kongreso; ne scias, pri ekstreme testaj verkoj, kiujn oni jam brile tradukis en Esperanton, aŭ ke multaj fakterminoj jam aperis; ne scias pri niaj radioprogramoj, sonbendoj, grupoj de aktoroj, horoj, turismaj aranĝoj...

Ni malofte sukcesas varbi seriozulojn, nur per anekdotoj pri nobla knabo en Bjalistoko, flago, du afiŝoj kaj kelkaj leteroj kun interesaj poŝtmarkoj. Kaj per tro mizeraj informoj aŭ impresoj pri naiveco, ni tro facile malvarbas.

Kvankam estas tre dezirinde, ke ni ĉiuj kiel eble plej plene komprenu nian grandiozan progreson de la jarcento, tamen multaj vere ne havas tempon aŭ monon, foje, eĉ, kun bonegaj intencoj, ne kapablon, por profundaj studoj. Sed eĉ por tiuj, kiuj havas tempon, monon kaj kapablon, estas limoj.

Esperanto jam atingis tian vortostokon kaj kulturon, ke, same kiel pri iu ajn fakstudinda, neniu, eĉ ne profesia fakulo, povas scii ĉion scieblan pri ĝi. Foje, indiki tion takte, responde al demando, povas utile imponi. Inteligenta humileco estas ĉi tie, kiel ĉie en la vivo, grava ingredienco en vera saĝo.

(El „Esperanto“, n-ro 7—8/1987)



## Jubilea Bilanco

Kune kun la tutmonda esperantistaro ni bulgaraj verdstelanoj solenis la 100-jaran jubileon de Esperanto. Enkadre de tiu ĉi impona festo ni modeste festis ankaŭ la 80-jarigon de BEA, fondita en 1907 en urbo Veliko Tŕrnovo.

Laŭ rekomendo de UEA la Centra Estraro de BEA skizis trijaran planon por realigi la antaŭstarantajn jubileajn entreprenojn.

Honore al ambaŭ jubileo estis stampitaj oraj medaloj kaj kupra reliefo de figuro de Ludoviko Zamenhof. Per tiuj medaloj estis distingitaj multaj veteranoj kaj aktivuloj.

La Ministerio de Poŝto presis poŝtmarkon, glumarkojn kaj kovertojn en granda eldonkvanto. La portreto de Zamenhof estis multobligita en kelkmil ekzempleroj.

La Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) kaj BEA eldonis koloran murkalendaron en eldonkvanto de tri mil ekzempleroj. La kalendaro trovis plaĉon ankaŭ eksterlande.

Estis presitaj sepmil afiŝoj kun teksto en Esperanto, rusa, angla, germana kaj franca lingvoj.

Transportebla ekspozicio, per koloraj bildoj kaj aŭtentikaj dokumentoj, montris la evoluetaĵojn, de Esperanto en nia lando. Ĝi estis eksponita en diversaj enlandaj urboj kaj ankaŭ en Ateno, Moskvo kaj Varsovio.

Donĉo Ĥitrov, ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“, verkis la scenaron de la plenlonga dokumenta filmo „Esperanto“, kiu, reĝisoris Roman Dobrzynski, prezidanto de PEA. La filmo estis prezentita kun granda sukceso dum la Jubilea Kongreso en Varsovio.

La Centra Estraro de BEA mendis dokumentan filmon, kiu rakontas pri la batalvojo de BEA dum okdek jaroj. Ankaŭ la Internacia Esperanto-Kursejo mendis koloran reklamfilmon pri la kursejo en Pisanica.

En la centraj kaj lokaj gazetoj multan spacon okupis artikoloj pri la centjara jubileo. Gazeto „Paraleli“ dediĉis al ĝi kvar grandformatajn paĝojn, gazeto „Borba“ — Veliko Tŕrnovo, publikigis sur kelkaj paĝoj la alfabeton kaj gramatikon esperantan. Entute aperis pli ol 60 materialoj — intervjuoj, artikoloj, eseoj. Ankaŭ la radio kaj televido kelkfoje raportis pri la jubileo.

Dank' al la amika rilato de redaktoroj de dekoj da gazetoj, la publika opinio subtenis serioze la aferon de la esperantistoj, batalantaj por paco kaj interkompreno.

Honore al la jubileo intense laboris tradukistoj, verkistoj, poetoj kaj publicistoj. Rezulte aperis pli ol 40 libroj kaj broŝuroj, estis venditaj pli ol kvardek mil lernolibroj.

Helpe al la propagandistoj Nikola Aleksiev kompilis veran enciklopedion sub titolo „Esperanto centjara“. Ĝi estas distribuita inter la societoj kaj la distriktaj estraroj.

Pri la agado de la partio, de laboristaj sindikatoj kaj Patrolanda Fronto oni informigas dank' al eldonitaj en Esperanto raportoj, referaĵoj kaj artikoloj de Todor Jivkov, Petŕr Dŭlgerov kaj Penĉo Kubadinski.

Fremdlingva eldonejo „Sofia-Press“ eldonis en Esperanto verkojn de la bulgaraj verkistoj Jordan Jovkov, Emilian Stanev, Georgi Karaslavov, Krum Velkov kaj Ljuben Stanev.

Satantoj de versaĵoj guis perlojn poeziajn de Aristoto Botev, Aristoto Smirnenki, Nikola Vapcarov, Penjo Penev kaj unuopajn versaĵojn de sesdek nuntempaj bulgaraj poetoj, kolektitaj en „Antologio de nuntempa bulgara poezio kaj prozo“.

Unikan laboron plenumis Canko Murgin, kompilinta la antologion „Roza kaj glavó“. En tiu versaĵkolekto oni trovas la nomojn de dekoj da bulgaraj poetoj verkantaj originale en Esperanto.

Cefe al nia lando dediĉis sian ĵus aperintan poemplibron „Vagante tra la mondo maltrankvila“ Nadija Andrianova, soveta poetino.

Eseoj kaj versaĵoj dediĉitaj al la centjara jubileo aperadis en „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „Interligilo“ kaj en la bulgarlingva gazeto „Esperanto-informoj“.

Pri diversaj priesperantaj temoj eldonis librojn Ivan Sivarov, Nikola Aleksiev, Aristoto Gorov, Belka Beleva, Georgi Miĥalkov, Nevena Nedelĉeva, Donĉo Ĥitrov, Canko Murgin, Vasja Cvetkova, Ljuba Bojaĝieva, Dimitŕr Pazov, Kiril Popov.

Depost 29 jaroj trupoj de Bulgara Esperan-

to-Teatro vizitas internaciajn kongresojn kaj prezentas teatraĵojn de diversnaciaj aŭtoroj. Dum la jubilea jaro BET enscenigis la dramverkojn „Pikniko sur la batalkampoj” de F. Arrabal kaj „La kavernoj de Salamanka” de M. Cervantes. La spektakloj brile sukcesis en Budapeŝto, Madrido, Varsovio kaj Zagrebo. Ankaŭ la pup-teatro el Vraca rikoltis grandan aplaŭdon en Krakovo kaj Varsovio.

Dum la 72-a UK en Varsovio artistoj el BET plenumis recitalon „Nia kara lingvo”.

Majstroj-kantistoj, kvarteto „Orbito”, ĥoris-roj el Sofio, Târgoviște, Pazargik faris recitalojn kaj koncertojn en Volgogrado, Pekino, Varsovio. Ankaŭ la ĉambra koruso de blindaj esperantistoj el Sofio koncertis kelkfoje en Pollando.

Gejunuloj amase partoprenis festivalojn de amatoroj-kantistoj kaj deklamantoj en Razgrad kaj Vraca.

Plene sukcesis la eksperimento — deviga lernado de Esperanto, en sofiaj mezlernejoj.

Mencianta artistojn, kantistojn, pupartistojn kaj ĥoristojn bulgaraĵn, ni aldonu pri la kanada kantistino Joëlle Rabu, kiu gastis en nia lando kaj koncertis en IEK-Pisanica, en Pamporovo kaj Sofio, admirata de miloj da aŭskultantoj. Grandan aplaŭdon ricevis la ĉambra koruso el Leningrado, koncertante en Plovdiv, Pisanica, Sofio kaj Bankja.

Gramofondiskoj kun kantoj kaj tekstoj de Veselin Damjanov, Mišo Zdravev, Jana Cikalova, Georgi Mihalkov, k. a. riĉigis la diskotekon de multaj esperantistoj el tutmondo.

Solenaĵoj dediĉitaj al la centjariĝo de Esperanto kaj al la okdekjariĝo de BEA okazis en Sofio, Ruse, Jambol, Veliko Târnovo, Kjustendil, Smoljan, Pazargik kaj en pluraj urboj kaj vilaĝoj, dum kiuj oni honoris per oraj medaloj kaj insignoj veteranojn kaj aktivulojn de la movado.

La duobla jubileo entuziasmigis la organizitajn en BEA esperantistojn kaj, rezulte de ilia aktiva propaganda laboro, nun nia asocio nombras pli ol dek mil anojn, el kiuj unu triono estas gejunuloj.

Ankoraŭ multaj aliaj aranĝoj okazis dum la jaro, kiujn ni ne povas mencii pro manko de spaco.

Dank’ al tiu ĉi aktiveco la aŭtoritato de BEA estigis sufiĉe alta kaj ĝi plene meritis la pokalon „Fein”, prijuĝitan de la 72-a UK.

BEA kompreneble ne intencas ripozi sur siaj laŭroj. En la dua jarcento de Esperanto BEA agados laŭ la rekomendoj de la kongresa rezolucio, „sekvante la daŭre validan ekzemplon de Ludoviko Zamenhof, en spirito de paco, laborem kaj espero”.

ARISTO GOROV

## Kvara sesio de AIS

De la 29-a de aŭgusto ĝis la 7-a de septembro 1987 okazis la Kvara Sesio de la Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) en San Marino.

AIS estis oficiale fondita (13.09.1985) en San Marino, laŭ decido de la registaro de Respubliko San Marino (RSM) de 19.05.1983. La oficialaj laborlingvoj estas 5: Esperanto, itala, angla, germana kaj franca. Ĝi zorgas speciale pri la aplikado de la Internacia Lingvo en scienca komunikado kaj en kulturo. La ĉefaj taskoj de AIS estas: realigi universitat-nivelajn kursojn en diversaj fakoj; organizi sciencajn sesiojn, helpantaj por interŝanĝo de scienca informado en diversaj fakoj, uzante internacian neŭtralan lingvon, t. e. sen lingva diskriminacio; ebligi akiron de akademiaj gradoj post ekzamenigo aŭ defendo de diserta-cioj; konfirmi la jam ricevitajn en diversaj landoj sciencajn gradojn kaj titolojn. Ĝis la 30-a de aŭgusto 1987 al AIS apartenas jam 38 plenrajtaj membroj, 48 asociitaj membroj kaj 103 adjunktoj el 33 landoj de ĉiuj loĝataj kontinentoj.

La inaŭguro de la IV-a Sesio okazis dimanĉon, la 30-an de aŭgusto, en la teatro Tizano, fare de la Senato de AIS. Ceestis ambaŭ ŝtatestroj de la Respubliko San Marino — la kapitanoj-regentoj Renzo Renzi kaj Francisko Carlo, la ministro por klerigo, kulturo kaj

justico, d-rino Fausta Morganti kaj la episkopo Giovanni Loccatelli. La Sesion partoprenis ĉ. 80 sciencistoj el 19 landoj de Norda kaj Suda Ameriko, Eŭropo, Afriko, Azio. Oni gvidis 13 sciencajn kursojn po 8 horoj en 6 sekcioj: kibernetiko, humanistiko, struktur-sciencoj, filozofio, natursciencoj, morfosciencoj; krome okazis 20 docentiĝprelegoj, debut-prelegoj kaj specialaj prelegoj de invititoj (po 60 minutoj).

La bulgaraj esperantistoj-sciencistoj estis reprezentitaj de Adoc. Stojĉo Stojĉev, kiu gvidis 8-horan kurson pri „Programado en Pascal” kaj prelegis pri „Rapida algoritmo de enklasiga proceduro de grafnodoj”; kaj Adoc. Daniela Deneva — ŝi prelegis pri „Prognozo de tertremoj”. La lecionoj kaj la prelegoj estis akceptitaj kun intereso de la partoprenantoj. Ilin sekvis diskutoj, en kiuj la fakuloj interŝanĝis opiniojn kaj rakontis pri siaj spertoj.

Mi volas speciale emfazi la gastamon de la Sanmarina registaro kaj popolo. La Sesio pasis en etoso de reciproka estimo kaj amikeco. Ĝi koincidis kun la solenaĵoj okaze de la nacia festo de Respubliko San Marino — la 3-an de septembro (1687 jaroj post ĝia fondiĝo), kiuj estis aparte impresaj kaj montris, ke la sanmarina popolo gardas siajn tradiciojn.

Daniela DENEVA

## XIV INTERNACIA KONGRESO DE LINGVISTOJ

(10–15. 8. 1987 — Berlino, GDR)

Interlingvistikaj problemoj ĝis nun ludis certan rolon en la kadro de internaciaj kongresoj de lingvistoj nur tri fojojn: en 1931 dum la 2-a en Genevo, en 1948 dum la 6-a en Parizo kaj en 1987 dum la 14-a en Berlino (GDR). En 1931 Otto Jespersen diskutis la lingvistojn pri la problemoj de „artefarita lingvo“ kaj popularigis la nocion „interlingvistiko“. En 1948 la bazan raporton por la sekcio D („interlingvistiko“) donis André Martinet. La 14-a kongreso, kiu okazis de la 10-a ĝis la 15-a de aŭgusto 1987 en Berlino (GDR), traktis la kadratan temon „Unueco kaj diferenceco en la nuntempa lingvoscienco. Disciplinaj kaj interdisciplinaj alproksimiĝoj kaj rezultoj“.

Pro la bona reputacio, kiun interlingvistiko gvas en lingvistikaj rondoj de GDR, ne estis malfacile proponi al la organizantoj enkadrigon de koncerna temaro en la kongresan programon. La rezultoj estis:

Dum la kongreso funkciis kiel n-ro 13 la oficiala „Ronda Tablo Interlingvistiko/Planlingvoj“, (Round Table Interlinguistics/Planned Languages), unu el 22 de tiaj „rondaj tabloj“. Ĝin iniciatis, preparis kaj gvidis d-roj Detlev Blanke, Ronald Löttsch (ambaŭ el GDR) kaj Sergej M. Kuznecov (Moskvo). Dum du kunvenoj de la Ronda Tablo, kiu estis indikita en la kongresprogramo kaj sur la in-

formtabuloj, estis prezentitaj entute 9 kontribuoj po 20 minutoj kun 20-minuta diskuto.

Post mallonga enkonduko fare de d-ro Detlev Blanke, kiu difinis la nocion „interlingvistiko“ kaj „planlingvo“ kaj atentigis pri la ĝisnuna rolo de interlingvistikaj problemoj dum la internaciaj kongresoj de lingvistoj, sekvis jenaj prelegoj: „Latino kiel lingvo de la scienca komunikado en pasinteco kaj nuntempo“ (prof. d-ro sc. Johannes Irmacher, membro de la Akademio de Sciencoj de GDR), en la germana; „Kian lingvon por kia komunikado!“ (d-ro Francisko Lo Jacomo, Parizo), en la franca; „Komputila lingvistiko kaj interlingvistiko“ (d-ro Hartmut Sörgel, Humboldt-Universitato Berlino, GDR), en la germana; „Planlingvo kaj ĝia signifo por lingvistika teorio“ (d-ro sc. Sergej N. Kuznecov, Instituto por Lingvistiko ĉe Akademio de Sciencoj de USSR, Moskvo), en la angla; „Lingva tipologio kaj planlingvoj“ (d-ro Dan Maxwell, Usono, nun ĉe BSO Utrecht, Nederlando), en la germana; „Semantika esprimforto kaj sintaksa unusignifeco. Esperanto kiel interlingvo de aŭtomata tradukado“ (d-ro Klaus Schubert, FRG, nun ĉe BSO Utrecht, Nederlando), en la germana; „Pri la „facileco“ de Esperanto“ (d-ro Stanislav Košecký, Bratislava, Slovaka Filologia Societo) en la germana; „Diakronio en planling-

vo — ĉe la ekzemplo de la 100-jara Esperanto“ (d-ro sc. Detlev Blanke, Kulturligo, Berlino, GDR), germane; „Gramatikaj germanismoj en Esperanto“ (d-ro Ronald Löttsch, Centra Instituto por Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de GDR), en la germana.

La du kunsidojn ĉeestis meze 20-25 personoj. Sekvis la prelegon vigla diskuto, parte en la germana, angla, franca, kaj ankaŭ kelkfoje en Esperanto.

Enkadre de alia Ronda Tablo, nome en n-ro 8 „Aŭtomata Tradukado“ prelegis d-ro Viktor Sadler (Grandbritio, nun ĉe BSO en Utrecht, Nederlando) pri DLT, en la angla.

Krom la „rondaj tabloj“ funkciis 30 sekciaj kunsidoj, kun po 10, 20 aŭ eĉ 30 prelegoj. La prelegoj daŭris 15 minutojn. Eblis 5-minuta diskuto. Inter ili estis tri prelegoj kun interlingvistika temaro (respektive rilata al ĝi).

Malsame al la 2-a kaj 6-a kongresoj ĉi-foje, dum la 14-a, oni diskutis ne nur teoriajn interlingvistikajn demandojn, sed plej grandparte povis eliri el la faktoj de la 100 jarojn funkcia Esperanto. La preparkomitato de la Kongreso aparte bonvenigis la esperantologajn prelegojn, ĉar ili ankaŭ estis komprenataj kiel omaĝo al la 100-jara lingvo. Fakte tio estis en la spirito de la UNESKO-rezoluoj.

D. BLANKE

## SIMPOZIO „100 JAROJN ESPERANTOLOGIO“

La 4-10. 10.1987 en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica okazis Internacia Simpozio Interlingvistika. Partoprenis trideko da esperantistoj el 8 landoj (Anglio, Bulgario, Francio, GDR, Hungario, Pollando, Sovetunio kaj Svisujo).

La partoprenintoj havis la eblecon aŭskulti interesajn prelegojn de Sergej Kuznecov — doktoro pri filologiaj sciencoj el Moskvo (Esplorokampo de interlingvistiko; Kosmoglot — la Unua interlingvistika societo en Rusio; Esperanto kaj Interlingua; Historio de internaciaj kongresoj pri interlingvistiko); Michel Duc Goninaz el Aix-en-Provence (La problemoj de la normo en Esperanto; Kio estas „vorto“ en Esperanto); Vilmos Benczik el Budapeŝto (Revoj kaj realaĵoj sojle de la 2-a jarcento; Strategiaj kaj taktikaj ebloj de l'internacia Esperan-

to-movado; La Esperanto-romano inter 1945 kaj 1987; La Esperanto-kulturo kaj ĝia nuna stato); Richardo Rokicki el Varsovio (Pri la problemoj de lingva normo en planlingvoj; Pri klasigo de Esperanta morfemaro konforme al la funkcio en la leksema strukturo; Pri la sintaksa sistemo de Esperanto); Violin Oljanov el Sofio (Apero kaj destino de la Fundamento; La Zamenhofa Gramatiko, ĉu nur el 16 reguloj); Kremona Baceva el Sofio (Esperanto kaj Occidental); Libertaria Mladenova el Sofio (Taskoj kaj problemoj de la Esperanto-instruado en Bulgario); Achim Zettler el Magdeburg, GDR (Pri la lernproceso en Esperanto-instruado); Gerda Häusler el Magdeburg, GDR (Interfero inter la angla, la germana kaj Esperanto kiel fonto de eraroj); Hartmut Sörgel el Berlino (Interlingvistiko, Esperanto kaj

Komputilingvistiko); Andy Künzli el Kriens, Svisujo (Situacio kaj evoluo de la Centro de Dokumentado kaj Esplorado pri la Internacia Lingvo).

Ĉiu prelego vekis grandan intereson ĉe la partoprenantoj. Sekvis viglaj diskutoj kaj interŝanĝo de opinioj. Dum la ferma kunsido la partoprenintoj substrekiis la altan nivelon de la ĵus finiĝinta simpozio.

Posttagmeze estis organizataj promenadoj en la ĉarma ĉirkaŭaĵo de la Kursejo kaj perbusaj ekskursoj al kelkaj vidindaĵoj en la sama regiono.

La Internacia Simpozio Interlingvistika estis organizita de la Internacia Unuiĝo de Esperantistoj-Filologoj kaj de Bulgara Esperantista Asocio.

Marin BACEV,

# SCIENCO KUN PERSPEKTIVO

(Intervjuo kun dr. sc. Sergej Kuznecov)

La Internacian Simpozion pri Interlingvistiko okazintan en IEK-Pisana (4-10.10. 87), kun tre valoraj prelegoj partoprenis ankaŭ Sergej Kuznecov — doktoro pri filologiaj sciencoj, supera lektoro en la Instituto de Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR. Li estis afabla respondi al kelkaj demandoj pri problemoj de la interlingvistiko.

— S-ano Kuznecov, ĵus finigis la Simpozio pri Interlingvistiko. Via opinio pri ĝia laboro?

— Por dece pritaksi la laboron de la simpozio, oni devas menciigi kelkajn faktojn. Antaŭ nelonge en Berlino okazis la 14-a Internacia Kongreso de Lingvistoj, enkadre de kiu estis organizita „ronda tablo“ pri temo „Interlingvistiko kaj planlingvoj“. Krom tio en USSR estis organizitaj du naciaj konferencoj. Unu el ili okazis en Moskvo, en la Instituto de Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj de USSR, kaj la dua okazos fine de oktobro en la Universitato de Tartu (Estonio). Do, mi partoprenis en multaj simpozioj, konferencoj kaj kongresoj kaj povas kompari. Fakte simila simpozio estas unua en sia speco en via lando, kiel vi mem diris, kaj la organizantoj certe havis malfacilaĵojn, ĉar temas pri io tute nova.

Kaj tamen, kun plena certeco mi povas diri, ke la scienca nivelo de tiu simpozio estis admirenda alta kaj ĝi estis tre bone organizita. Partoprenis reprezentantoj de Britio, Bulgario, Francio, GDR, Hungario, Pollando, Svislando kaj USSR kaj estis prezentitaj raportoj diverstemaj, ĉiu kun tre riĉa fakta kaj teoria enhavo. Estis interesaj diskutoj, ilin partoprenis ne nur prelegantoj, sed ankaŭ aŭskultantoj, kaj tiuj lastaj tre ofte intervenis per tre saĝaj rimarkoj kaj demandoj.

Dum la simpozio ne nur estis farita bona scienca laboro, sed ankaŭ la partoprenintoj akiris gravan unuigan sperton, amikigan en la plej bona senco de tiu vorto. La partoprenintoj, kiuj konis unu la alian pere de siaj verkoj, disigis kiel tre bonaj amikoj. Kaj tio estas serioza sukceso, ĉar amikeco estas ne malpli grava ol sciencaj atingoj. Ili starigis arojn de novaj problemoj kaj projektis fendaĵojn por plua evoluigo de la interlingvistiko internaciskale. Inter la gravaj proponoj estis tiu pri daŭrigo de tiuspecaj simpozioj — ĉu en Bulgario, ĉu alilande, tamen laŭ la metodoj jam aprobitaj en Pisana.

— Pri kio vi okupiĝas profesie?

— Mi okupiĝas pri germanaj lingvoj — la angla kaj la skandinavaj lingvoj, precipe pri la dana. La interlingvistiko estas mia dua profesia okupo. Jam aperis kvar miaj libroj pri tiu temo. Krome, mi prelegas al studentoj en la universitato „Patris Lumumba“ en Moskvo.

— Ĉu interlingvistiko estas serioza scienco?

Ĝi ne nur estas serioza scienco, ĝi donas unikajn eksperimentajn faktojn pri la lingvo ĝenerale. Post la apero de la unuaj kritikataj internaciaj lingvoj, kelkaj elstaraj lingvistoj, ekzemple Bodouin de Courteney kaj Schuhardt taksis la planlingvojn kiel tute novan klason de la lingvoj de la homaro. Ili montris, ke iuj lingvistoj asertas la neblon de artefarita lingvo pro malbona kompreno de la naturaj lingvoj ĝenerale. Courteney montris, ke en naturaj lingvoj estas multaj elementoj artefaritaj kaj inverse en artefaritaj lingvoj estas fenomenoj tute naturaj, ekzemple spontana evoluo de tiuj lingvosistemoj. Pro tio la analizo de artefaritaj lingvoj ebligas al ni pli bone kompreni la ĝeneralajn leĝojn de la lingvofunkciado. Pro tio la interlingvistiko estas tre grava scienco.

— Vi jam havis kontakton kun viaj kolegoj el la Sofia Universitato „Kliment Ohridski“. Ĉu laŭ vi eblas paroli pri eventuala organizo de kurso pri interlingvistiko tie?

— Certe jes. Oni jam neoficiale invitis min prelegi en la Sofia Universitato, kaj estos bone, se tio efektiviĝos.

— Pri kio vi okupiĝas enkadre de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj kaj kiaj estas la nuntempaj taskoj de tiu organizo?

Enkadre de ASE mi gvidas fakon pri esperantologio. Kiel vi scias, en mia lando nun realiĝas granda renoviga laboro, kiu koncernas ankaŭ ASE. Mi tamen devas diri, ke „la renovigo“ ankoraŭ ne faris al si larĝan vojon al ASE kaj estas multaj misoj. ASE-anoj mem konscias tion. Por ke la afero ekmarŝu pli bone, fine de la kurenta jaro aŭ komence de la nova jaro estos organizita tutlanda reelektita konferenco. Nun la lokaj Esperanto-kluboj sendas proponojn lige kun la tagordo de tiu konferenco. Temas pri novaj demokratiaj metodoj de administrado, pri pli efika laboro.

La Esperanto-movado estas plej forta en la baltaj respublikoj, kie oni serioze laboras, organizas tendarojn por lernado kaj praktikado de la lingvo, teoriajn konferencojn. Forta estas la movado ankaŭ en la Siberia regiono, kie esperantistoj, krom pri instruado de Esperanto okupiĝas ankaŭ pri sciencaj esploroj.

— Viaj impresoj pri Bulgario?

— Mi unuafoje estas en via lando kaj mi povas diri, ke ĝi tutege plaĉis al mi. Mi havis eblecon vidi multajn belegajn lokojn. Tamen plej grandan impreson faris al mi viaj homoj: amikaj, gastamaj, bonkoraj, ili posedas bonegan senton pri humuro, kio plej multe plaĉis al mi.

Intervjuis: Nedka VALJAVICARSKA

## INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Esperantologoj, interlingvistoj kaj aliaj fakuloj interesitaj pri interlingvistika problemaro povas ricevi „Informilon por Interlingvistoj“ eldonatan de Akademia Centro Interlingvistika kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. IPI-kajeroj enhavas informojn pri nove publikigitaj studoj pri ĉiuj aspektoj de interlingvistiko kaj esperantologio, informojn pri esploroj kaj esplorprojektoj,

pri konferencoj kaj seminarioj en kaj ekster la E-movado. La informilo aperas 3-4-foje en la jaro kaj enhavas po 16 paĝojn. Fakuloj interesitaj pri interlingvistika kaj esperantologia temaroj povas ĝin senpage ricevi de: Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 Bĵ Rotterdam, Nederlando.

Ryszard ROKICKI,  
redaktoro de IPI

## ESPERANTO EN PROFESIOJ

La iniciatamaj kaj gastamaj esperantistoj el Vraca jam delonge famigis kiel bonaj organizantoj de diversaj internaciaj aranĝoj. Ankaŭ ĉi-jare (la 17-an kaj la 18-an de oktobro en la salono de la Domo de Bulgara-Sovetia Amikeco), ili okazigis du gravajn sciencajn simpoziojn kun internacia partopreno pri temoj: „Esperanto en profesioj“ kaj „Esperanto kaj kosmaj esploroj“. La seminariojn partoprenis ĉirkaŭ 40 esperantistoj el diversaj partoj de la lando kaj gastoj el Svislando, GDR, Pollando.

Varme bonvenigis la partoprenantojn la prezidanto de la Distrikta Estraro de Bulgara Esperantista Asocio Stojan Pavunčev, kaj bondeziris al ili fruktodonan laboron.

Bazan raporton „Esperanto en profesioj“ faris ing. Petăr Todorov, vic-prezidanto de BEA. Per konkretaj ekzemploj la preleganto parolis pri ĉiam pli sukcesa penetro de Esperanto en diversajn sferojn de la vivo, en la ĉiutagan praktikon de la homoj, en plej modernajn branĉojn de la scienco, tekniko kaj arto, ekologio, aviado, komputado, bio-kemio, kinematografio, televizio k. a. Li substrekiis, ke la uzado de Esperanto en diversaj fakoj kaj profesioj riĉigas ĝian leksikon, ĉar kreigas novajn nociojn kaj terminojn. Li atentigis la aŭskultantojn, ke ĉe UEA jam funkcias speciala Terminologia Sekcio, kiu reguligas la enkondukon de novaj terminoj.

En sia raporto „Esperanto en kinematografio kaj televizio“ Dončo Hitrov, ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“ kaj prezidanto de la Internacia Ligo de Esperantistoj-Kino-Foto-Amatoroj (ILEF), parolis pri la impeta penetro de la Internacia Lingvo en la mondan kulturon. Li donis multajn ekzemplojn pri filmoj (precipe dokumentaj), pri apartaj esperantistaj aranĝoj realigitaj en diversaj landoj post la jaro 1930. Dum la 44-a UK de Esperanto en Sofio (1963) estis fondita ILEF kiel neŭtrala kunlaboranta kun UEA organizaĵo. Tiu evento multe influis la ĉiam pli oftan uzadon de Esperanto en filmproduktado kaj televizio. Menciindas la produktitaj de skipoj de ILEF dokumentaj filmoj pri la 44-a kaj 63-a UK de Esperanto en Sofio kaj Varna, pri IFEF-kongreso en Slančev Brjag, Bulgario (1984), pri IEK en Pisanica kaj speciale la plenlonga dokumenta kolora filmo „Esperanto“ (Bulgara-pola kunproduktado sub la aŭspicio de ILEF), omaĝe al la 100-jara jubileo de Esperanto, kies premiera projekciado okazis en Varsovio ĉi-jare.

Andy Künzli, ĝenerala sekretario de Svisa Esperanto-societo, redaktoro de revuo „TEJO-Tutmonde“, rakontis pri la agado de la E-centro de Chaux-de-Fonds, kaj pri la Internacia FERIA Altlernejo, en kiuj oni prelegas pri diversaj profesiaj temoj kaj pri aplikado de Esperanto. A. Künzli substrekiis, ke necesas komunaj penoj por enkonduko de la Internacia Lingvo en diversajn fakmediojn, pri kio multe helpas similaj seminarioj, kursoj kaj aliaj aranĝoj.

Ronald Schindler, prezidanto de la Distrikta Estraro de E-asocio en Frankfurto-sur-Odro (GDR), prelegis pri la aplikado de Esperanto en mediprotektado surbaze de la spertoj de sciencistoj kaj sociigantoj en la ĉebaltaj regionoj, precipe en GDR.

Violin Oljanov, ĉefredaktoro de revuo „Paco“, membro de la Akademio de Esperanto, rakontis pri sia propra sperto de uzado de la Internacia Lingvo en liaj profesiaj okupoj pri ĵurnalistiko, tradukado kaj interlingvistiko.

Valja Georgieva kaj Lili Georgieva el Vraca prezentis raportojn senditajn de Rolf Guse el Schwerin (GDR), kaj de Gonçalves Neves (Portugallio), kiuj traktas ege interesajn problemojn pri aplikado de Esperanto en la tekniko, tradukado kaj interpretado.

Ing. Nikola Uzunov el Haskovo kaj Ljubomir Tri-

fončovski el Vraca rakontis pri sia propra sperto kaj faris interesajn kaj valorajn proponojn pri enpenetro de Esperanto en la sciencan kaj teknikan, pri eldonado de E-lernolibroj por fakuloj, organizado de E-kursoj en ĉiuj sciencaj institutoj kaj altlernejoj, emfazante, ke la esperantistoj devas esti lingvo-perantoj por tiuj, kiuj deziras korespondi laŭ fakaj interesoj. L. Trifončovski ankaŭ pledis pri fondo de Informcentro ĉe BEA, kiu havu la taskon kolekti kaj traduki plej interesajn artikolojn de eminentaj sciencistoj-esperantistoj, varbi sciencistojn kaj fakulojn kaj engaĝi ilin en pli aktiva kontribuado.

Ing. P. Todorov faris konkludan parolon, en kiu li substrekiis la grandan utilon de tiu sukcesa aranĝo. Li rekomendis al la organizantoj de la sekva simpozio (en 1990) inviti ankaŭ sciencistojn-neesperantistojn, por ke ili informigu kaj konvinkigu pri la efika funkcio de Esperanto kaj ĝia aplikado en profesioj.

Radi BANCEVSKI

## TRIDEK JAROJ DE KOSMAJ ESPLOROJ

La 18-an de oktobro 1987 en la nova Etnografia Muzeo en Vraca okazis Dua Internacia Sciencia Esperanto-Seminario pri Kosmaj Esploroj, organizita de DE de BEA kaj de la Filio de Bulgara Astronaŭtika Societo. Ĉeestis pli ol 40 fakuloj kaj interesitoj el Sofio, Haskovo, Stara Zagora, Pernik, Miĥajlovgrad, Sumen, Sandanski, Orjaĥovo, Kozloduj kaj gastoj el GDR, Pollando kaj Svislando. Inter ili estis ankaŭ la vicprezidanto de CE de BEA Petăr Todorov.

Estis transdonitaj la salutoj de Aleksandăr Aleksandrov, kiun oni preparas nun kiel duan bulgaran kosmonaŭton.

Inaŭguran prelegon „Tridek jaroj de kosmaj esploroj“ faris Kiril Velkov el Vraca. Li rememorigis la sukcesojn de la homaro en la kosmaj esploroj: la unua artefarita satelito „Sputnik“, la unua kosmonaŭto, la unua virino-kosmonaŭto, la unua eliro de homo en la kosmon, la unua surpaŝo de homo sur alia astro... Ĝis la flugoj de kosmaj ŝipoj por multfoja uzado. La preleganto parolis ankaŭ pri la grava rolo de la kosmaj esplorantoj por konservado de la paco en la Kosmo kaj sur la Tero.

La kandidato de filozofiaj sciencoj Cvetan Kardašev el Sofio prelegis pri temo „Konstantin Ciolkovskij kaj la antropokosmismo de la dudeka jarcento“. La kandidato de teknikaj sciencoj Kalinka Baeva el Sofio kaj C. Kardašev prezentis temon „Kosmologio kaj ekologia futuro de la homaro“. Pri la apliko de kosmaj metodoj ĉe esplorado de tertremoj prelegis Daniela Deneva el Sofio. Ingeniero Ronald Schindler el urbo Frankfurt/Oder parolis pri la kosmoflugo de S. Jähn kaj pri la eĥoj en la gazetaro de GDR.

Esperantistoj el Vraca prezentis la prelegojn ricevitaĵojn de eksterlandaj fakuloj: Bernadr Golden el Hungario („La esperantigo de eksterteraj nomoj“), „La Esperanto-nomoj de la satelitoj de Jupitero“ kaj „Kiel instrui la marsan lingvon al teranoj?“ — pri la sciencfikcia literaturo kaj David Galadi Enríques el Hispanio („Marso: preter la biologia elreviĝo“). Estis prezentita ankaŭ la prelego de Ilja Andrejev el Sumen pri la unua esperantlingva versaĵo, dediĉita al la kosmoflugo de Jurij Gagarin.

Por la ĉeestantoj estis projekciita la nova dokumenta-sciencia filmo „Mesaĝo de la dioj“.

La seminario pruvis la praktikan utilon de la Internacia Lingvo en la laboro de specialistoj pri kosmaj esploroj. Renkontiĝoj de fakuloj el diversaj branĉoj de la scienco estas necesaj. Ili ebligas la interŝanĝon de plej moderna scienc-teknika informado pere de Esperanto.

Ljubomir TRIFONČOVSKI

## NEŬTRALECO KAJ TOLEREMO

La unua TEJO/BEJ-seminario jam estas fakto. Laŭ propono de la "eksa" TEJO-prezidanto Ian Jackson ĉi-foje la internacia junulara seminario, organizata ĉiujare en Bulgario, estis sub la aŭspicio de TEJO. Sed en ĝia preparo kaj efektiviĝo flanke de TEJO partoprenis nur Jan Koszmaluk — eksa ĝenerala sekretario de TEJO kaj ĝia nuna prezidanto. Bedaŭrinde, la ceteraj eksaj kaj novelektitaj estraranoj — eĉ la respondeculoj pri landa agado, tute ne montris intereson al la seminario. Krome, ne estis utiligitaj la eblecoj, kiujn disponigas la Internacia Esperanto-kursejo en Pisanica por serioza laboro internaciale. Ni rememoru la rezultojn de la pasintjara BEJ-seminario, kiu ne nur estis unika kiel atmosfero, sed kontribuis por pliriĝo de la konoj pri la E-movado de la partoprenantoj, kaj enkadre de kiu estis organizita ankaŭ neformala kunveno de TEJO-komitatanoj.

Ĉi-jare kolektiĝis ses gekomitatanoj, kvar el kiuj gebulgaroj. Fakte la aktivuloj, kiuj partoprenis la seminarion, estis malmultnombraj kompare kun la ceteraj esperantistoj, kiuj ankoraŭ ne havas sufiĉe da sperto en la movado kaj kompreneble ne povis multe kontribui por altigo de la seminario nivelo. Mi ankaŭ mencias la konstantan movadon de la partoprenantoj: iu alvenis, alia forveturis — tio sendube malhelpis la normalan laboron.

Kaj tamen la seminario okazis kaj ĝi estis vere internacia. De la 28-a de septembro ĝis la 4-a de oktobro j. k. en Pisanica kunvenis proksimume 40 gejunuloj el 10 landoj: Belgio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Greklando, Hispanio, Hungario, Pollando, Sovetunio, kaj Svislando. Mi volas speciale emfazi, ke ĉi-jare por unua fojo la seminarion partoprenis reprezentantoj de la Junulara Komisiono ĉe la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj: Natalija Soroĥova — prezidantino, kaj Valentin Seguru — vicprezidanto. Gastoj de la arango estis Clément Tholet — ĝenerala sekretario de Mondpaca Esperanto-Movado kaj la konata E-poetino el Kievo Nadija Andrianova.

La seminarion malfermis Cvetka Miteva — prezidantino de BEJ. La partoprenantojn salutis Ivan Belĉev — ĉefredaktoro de la bulgara revuo „Defendo de la paco“ kaj reprezentanto de la alta protektanto de la seminario Georgi Dimitrov-Goŝkin — prezidanto de la Nacia Komitato por Defendo de la Paco. En la nomo de TEJO salutparolis ĝia prezidanto Jan Koszmaluk.

La seminario programo konsistis el du partoj: la unua estis dediĉita al la temo „La Esperanto-junularo — por paco“, la alia — al esperantologiaj problemoj.

La ĉi-jara seminario certe kontribuis al la junulara movada sperto per tio, ke dum sia laboro la partoprenantoj traktis sincere diskutindajn problemojn. Mi mencias iujn el ili: toleremo en la E-movado — inter homoj kun diversaj mondkonceptoj; influo de la sociopolitika vivo sur la esperantisttan movadon; neŭtraleco de TEJO; ĉu TEJO organizu sian kongreson en 1988 en Sud-Koreujo kaj ĉu ĝi partoprenu en la Tutmonda Junulara Festivalo en Phenjano. La ĉeestantoj traktis ankaŭ la problemon pri politikumado en la internaciaj E-medioj. Fakte tian interparolon komencis en n-ro 2/1987 de „TEJO-Tutmonde“ (TT) ties redaktoro Andy Künzli. En la sekvonta numero de „BE“ vi povos legi enketon pri la koncernaj demandoj.

En la unua programero per prelegaj kontribuoj partoprenis Clément Tholet (pri la pacarangoj dum la 72-a UK en Varsovio). Johano Balla, Hungario („La

pacagado de la junaj hungaraj esperantistoj“). Inter la plej interesaj prelegoj estis tiuj de Kiril Velkov — doktoro de la teknikaj sciencoj ĉe Bulgara Akademio de Sciencoj. Li prelegis pri temoj: „30 jaroj de paca Kosmo“ kaj „NIFO“ (t. n. flugantaj teleroj) — ĉu realeco? Ljubomir Trifonĉovski, Bulgario, rakontis pri la mondfama pentristo Nikolaj Rjoriĥ — humanisto kaj pacdefendanto.

Allogaj estis ankaŭ la prelegoj inkluzivitaj en la esperantologia parto. Kremona Băceva, Bulgario, parolis pri la lingvo Volapük, Andy Künzli, Svislando — pri la spertoj de Kultura Centro Esperantista en la svisa urbo Chaux-de-Fonds. Dimitar Dimitrov, Bulgario, kontribuis per la temo „Problemo pri la estonteco de la lingvoj. Perspektivoj kaj duboj“; Kostas Zaharakis, Greklando, prelegis pri la signifo de la vortoakcento. Estis interparolo kun la redaktoroj de „TT“ — Andy Künzli, kaj de „Kataluno“ — Carles Berga Molina.

Laŭ propono de Jan Koszmaluk la ĉeestantoj diskutis la proponon pri Internacia Centro de E-kulturo en Bjalistoko, Pollando, anoncitan dum la 72-a UK en Varsovio. Inter la interesaj opinioj estis tiu, ke la Centro estigu sidejo de la Akademio de Esperanto. La proponoj estos senditaj al UEA, por pritraktado.

Dum la libera tempo estis organizitaj ekskursoj en la regiono — vizitoj al la etnografia muzeo en Smoljan, la ripozloko Pamporovo kaj la arkitektura rezervejo — vilaĝo Siroka Laka, kun ĝia Mezlernejo por Folkloraj Kantoj kaj Instrumentoj. Tie estis prezentita filmo pri la instrumentadoj en la lernejo. Gefernantoj proponis improvizitan koncerton.

Kaj fine jen tri opinioj pri la unua TEJO/BEJ-seminario:

## Jan Koszmaluk, prezidanto de TEJO:

— Ĝi sendube estis tre interesa. Antaŭ ĉio mi devas danki al la organiza teamo de BEJ. La seminario pruvis, ke esperantistoj kun diversaj mondkonceptoj povas interkompreniĝi, malgraŭ ke foje replikoj estis spicitaj per propraj emocioj. Mi kredas, ke en Pisanica ni tuis nur malgrandan faceton de nemezurebla temo. Mi ekhavis la impreson, ke la partoprenantaro ĝenerale kontentiĝis pri la seminario enhavo kaj tio signifas, ke nia komuna de TEJO kaj de BEJ seminario estas sukcesa.

## Andy Künzli, redaktoro de „TEJO-Tutmonde“:

— Mi estas plene kontenta de la seminario. Bedaŭrinde, inter ni ne estis pli da TEJO-aktivuloj. Por tiu specaj arangoj ni estonte devos pli forte varbi. Mi estis iom seniluziĝita de la junaj bulgaraj delegitoj senditaj de la distriktoj. La BEJ-estraro devos cerbumi kiel maniere integri ilin en la internacian laboron de TEJO. La BEJ/TEJO-seminario estis inform- kaj diskutsemaĵo kun la celo trovi novajn laborformojn por nia junulara agado. La bulgaroj reprezentantaj laŭmembre la plej fortan Landan Seĝon de TEJO, ne povas stari ĵanke.

Valentin Seguru, vicprezidanto de la Junulara Komisiono ĉe ASE:

— Mi deziras elkomenci danki al BEJ kaj BEA pro la invito de nia dupleksa delegacio. Ĉi-tie en Pisanica, la esperantista junularo havis eblecon libere kaj demokratie interŝanĝi opiniojn pri la plej ĉefa problemoj — la paco, kaj krome pri pluraj aliaj interesaj demandoj, precipe movadaj.

Maria JANKOVA

## PRI LA NECESO PAROLI ESPERANTON

En la enkonduko de la tre valora 250-paĝa libro „Interlingvistiko, Esperantologio“, eldonita de Bulgara Esperantista Asocio, akademiano Violin Oljanov skribis:

„La bulgara Esperanto-movado famiĝis per sia amaseco kaj plej granda nombro de asociaj membroj. En la lasta jardeko ĝi montras gratulindan aktivecon... Ĉio ĉi estas tre pozitiva kaj ĝi montras evidente supreniron de la landa movado.

Tamen la esperantista amaso postrestas en sia lingva nivelo. Multaj el la sociaj membroj, kaj eĉ aktivuloj, longe (iam — konstante) restas kun siaj komencaj scioj, ne strebas al progreso, kaj la societoj ne helpas ilin. ...“

Multaj konstatas, ke ni ne bone posedas Esperanton, ĉar ni evitas uzi ĝin en nia aktiva ĉiutaga organiza agado. Nia laboro por Esperanto efektiviĝas precipe en nia nacia lingvo. Esperantan parolon oni malofte aŭdas dum konferencoj, seminarioj, kunvenoj, kunidoj, renkontiĝoj k.a. aranĝoj, escepte de la okazoj, kiam ĉeestas eksterlandanoj.

Kelkaj aktivuloj kaj organizaĵoj, ekz. la redakcio de revuo „Bulgara Esperantisto“ la Turista Sekcio ĉe BEA, k. a. bone komprenas la grandan signifon de la ĉiutaga uzado de Esperanto kaj lastatempe ili ĉiam pli ofte aplikas ĝin en sia ĉiutaga laboro. Sed ankoraŭ estas multaj funkcioj kaj aktivuloj, kiuj obstine evitas paroli Esperanton en bulgara samideana medio, pravigante sin per la falsa argumento, ke se ni parolas Esperante, ni forpelos de la movado la novajn geesperantistojn. La vera kialo tamen estas, ke ili mem ne bone posedas la lingvon.

Al ĉiuj devas esti klare, ke sen konstanta praktikado oni

neniam ekposedos la lingvon. Jen kion Zamenhof diris pri ĉi-afero:

„Vi eble miros, ke mi parolas al vi ne ruse, sed Esperante: vi eble diros, ke ĉar ni havas nun kongreson de samregnanoj kaj ĉiuj, aŭ almenaŭ preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj komprenas tre bone la saman lingvon, estas multe pli nature paroli al ili en tiu lingvo. Ekzistas tamen gravaj kaŭzoj, pro kiuj mi elektis por mia parolo tiun lingvon, por kiu ni batalas kaj por kiu ni kunvenis.

Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukatan. Esperantistoj disĵetitaj en diversaj urboj kaj urbetoj, kunvenas en pli aŭ malpli granda amaso, por aŭdi nian lingvon, por kontroli, ĉu ili ĝuste ellernis la lingvon, ĉu ili bone ĝin komprenas, por kompari sian propran manieron de parolado kun la parolmaniero de pli spertaj esperantistoj. Kiam ili poste revenas hejmen, ili ne sole mem parolas pli pure, sed ili alportas modelon de bona parolado al tiuj, kiuj restis hejme. Tiamaniere la kongresoj reguligas la uzadon de la lingvo, kaj dank' al niaj kongresoj jam nun oni parolas Esperanton egale perfekte ne sole en la plej malproksimaj anguloj de ĉiu aparta regno, sed en ĉiuj plej malsamaj lokoj de la tuta tera globo. Jam nun, kiam oni aŭdas bonan kaj spertan esperantan oratoron, oni neniel povas diveni, al kia nacio aŭ lando li apartenas. La plena aŭtonomia vivo de nia lingvo, kun ĝia absolute propra, ne pruntita kaj ne imitita spirito, ĉiam pli kaj pli fortikiĝas tiamaniere, kvaŭ ĉiuj esperantistoj de la mondo loĝus kune sur unu malgranda peco da tero.

Ne malpli grava estas la eduka signifo de la esperantistaj kongresoj. Izolitaj esperantistoj, kiuj neniam havis la eblecon praktike apliki tion, kion ili lernis, ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni povas tiel bone interkompreniĝi. Eĉ interne de la esperantistaj grupoj oni ofte ne kuraĝas paroli esperante, oni balbutas, oni preferas paroli en sia nacia lingvo, kaj proporcie al la nekuraĝeco de la parolado aperas ankaŭ la nekuraĝeco de la propagando, ĉar la esperantistoj-balbutantoj malgraŭvole ne povas liberigi sin de la timo, ke eble tamen Esperanto estas afero pli teoria, ol praktika. Sed kiam la balbutanto venas al kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io viva kaj vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la lokaj, tiamaniere edukas konvinkitajn, sekve ankaŭ entuziasmajn batalantojn por nia afero.

Tio estas la ĉefaj motivoj, pro kiuj ni en ĉiuj niaj kongresoj, ne sole en la universalaj, sed ankaŭ en la naciaj aŭ regionaj, nepre devas paroli ne sole pri Esperanto, sed ankaŭ per Esperanto.“

(El parolado de L. Zamenhof en St. Peterburg, 1910)

Mi volas kredi, ke post tralego de la opinio de Zamenhof pri malbona efiko de naciolingva parolado en esperantista medio, ĉiuj malnovaj kaj novaj geesperantistoj strebos tion ne fari. Ni devas esti ĝentile kaj afable senkompromisaj tiurilate.

Nikola NIKOLOV

## LONGE ATENDATA LIBRO

Nikola Aleksiev, „Esperanto 100-jara“. Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1987. Formato: 14×20 cm, Paĝoj: 234. Prezo: 0.35 lv.

Okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto Bulgara Esperantista Asocio aperigis la libron „Esperanto 100-jara“ de la elstara veterano de nia movado Nikola Aleksiev. Verkita en bulgara lingvo, ĝi estas orientita al la bulgara neesperantista legantaro — precipe al personoj, kiuj entute ne estas informitaj pri la problemoj de internacia lingvo ĝenerale kaj pri Esperanto konkrete, aŭ estas nesufiĉe informitaj, aŭ eĉ misinformitaj, pro kio ili kontraŭas al Esperanto.

En la unua parto la aŭtoro pritraktas la problemojn pri internacia lingvo ĝenerale: neceso de internacia komunikado; ĉu eblas alpreni de iu nacia lingvo por internacia komunikado; ĉu estas ebla artefarita (plana) lingvo; ĉu sola persono povas krei lingvon; biografiaj notoj pri L.L.Zamenhof.

Sekvas bazaj informoj pri Esperanto — konciza (plej ĝenerala) karakterizo de la lingvo, en cento da

linioj; konkretaj ekzemploj el la gramatiko kaj vortaro de Esperanto; kial oni nomas Esperanton „helpa“ lingvo; la rilato de UNESKO al Esperanto.

Vastan lokon en la libro okupas opinioj de elstaraj personoj — Leo Tolstoj, V.I.Lenin, Konstantin Ciolkovskij, Georgi Dimitrov, Maksim Gorkij, Romain Roland, August Forel, Upton Sinclair k. a.

Apartaj ĉapitroj estas destinitaj al la literaturo (traduka kaj originala) en Esperanto, al la loko de Esperanto en lernejoj, en amas-komunikiloj kaj en turismo; al esperantistaj organizaĵoj kaj movadoj, al periodaĵoj en Esperanto.

Speciale kaj tre interese estas pritraktita la temo: „Socialismo kaj internacia lingvo“.

Tre grava el propagando vidpunkto estas la ĉapitro „Kial lerni Esperanton?“, en kiu la aŭtoro tre detale argumentas la utilon de lernado kaj praktikado de la Lingvo Internacia.

Mi estas forte konvinkita, ke traŝirante tiun ĉi libron, eĉ la plej obstina skeptikulo konstatos, ke

dum la pasintaj cent jaroj de ekzistado de la helpa artefarita lingvo ĝi multfoje pruvis sian rajton ekzisti kaj disvastiĝi tra la tuta mondo.

Oni de longe sentis la neceson de simila libro orientita al la bulgara neesperantista legantaro. Jen pro tio la aŭtoro kaj Bulgara Esperantista Asocio meritas specialajn gratulojn, des pli ke la verko aperis en la antaŭtago de la 100-jara jubileo.

Nikola Aleksiev jam pli ol sesdek jarojn estas esperantisto. De 1963 ĝis 1978 li estis senŝanga prezidanto de Mondpaca Esperantista Movado kaj nun — ĝia honora prezidanto. Krome, li estas honora membro de UEA kaj dum dekdum jaroj (1964—1976) estis prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio. Do, li bonege konas ne nur la historion de aĉero kaj disvastigo de Esperanto, sed ankaŭ ĉiujn litigitajn kun ĝi lingvajn, politikajn, kulturajn, ekonomiajn kaj aliajn problemojn. Tamen en la libro li sukcesis eviti subjektivajn enlogigojn kaj tre objektivaj, kun rara konscienco kaj detala pristudo, sed samtempe freŝe kaj populare li prezentas kaj analizas la faktojn kaj la okazintaĵojn.

Grandan intereson prezentas tiu

## Sub hispana ĉielo



Rigardo al Hihon.

Bulgarajn kaj hispanajn esperantistojn jam de multaj jaroj ligas intima fruktodona amikeco: vigla korespondado, partopreno en junularaj laborbrigadoj, interŝanĝo de libroj, peranteco de eldonoj, reciprokaj vizitoj.

Dekoj da bulgaraj esperantistoj batalis defende al la Hispana Respubliko dum la civitana milito (1936), multaj el ili heroe pereis sur hispana tero por liberigo de la hispana popolo elsub la faŝisma reĝimo.

Dum la lastaj du jaroj kelkaj bulgaraj esperantistoj vizitis Hispanion. Ĉi-sube ni publikigas la impresojn de Bojana PRO-DANOVA, veterana esperantistino el Gabrovo:

Laŭ komisio de Bulgara Esperantista Asocio, lige kun la jubilea programo por celebado de la 100-jariĝo de Esperanto, mi ofice vojaĝis al urbo Hihon (Gijon) en Hispanio. La vojaĝo per vagonaro estis longa kaj peniga, sed la vidaĵoj de Adriatiko kaj Mediteraneo — belegaj!...

Mia korespondanto Julio Argüelles (Julio Arguejes) — sekretario de la societo en Hihon, helpis al mi por efektive de miaj taskoj.

Hihon — la plej riĉa urbo de Asturio, situas en la centro de Costa Verde (Verda marbordo) de Kantabra Maro. Ĝi estas pitoreska urbo kun 300 mil loĝantoj kaj havas la plej longan strandon en Norda Hispanujo, grandajn komercan kaj fiskaptistan havenojn kaj industrian zonon. Min forte impresis la beleco de Hihon, kun ĝiaj malnovaj kaj modernaj konstruaĵoj, preĝejoj, ĝardenoj kun palmoj kaj verdaj arbustoj... La urbo speguligas en la kvietaj klara akvo de Kantabra Maro. La granda bela apudmara parko havas riĉan zoon kun raraj bestekzempleroj. Inter belaj statuoj kaj pavilonoj aparte reliefigas la monumento de reĝino Isabel, kiu insistis antaŭ reĝo Ferdinando helpi al Kolumbo por realigo de lia ekspedicio.

La malnova universitato apud la urbo de malproksime similas al

parto de la libro, kie Nikola Aleksiev detale argumentas kial ne eblas alpreni iun nacian lingvon kiel internacian kaj kial hodiaŭ estas treege grava la penso de Lenin: „Absolute neniam privilegio al iu ajn nacio, al iu ajn lingvo!“

Konklude Nikola Aleksiev skribas: „La venko eĉ de progresemaj ideoj kaj vivkonceptoj ne venas aŭtomate, nur pro tio, ke ili estas progresemaj. Estas necesa longa kaj ofte tre peniga batalo. Por ke la homoj estu gajnitaj por apogi la novan aferon, ili bezonas klarigan laboron kaj seriozajn argumentojn. La socio bezonas objektivan, honestan kaj sinceran informadon.“ La libro „Esperanto 100-jara“ proponas al la legantoj ĝuste tian informadon. Jen pro tio mi tralegis ĝin kun granda intereso kaj mi kredis, ke ĝi nepre helpos la pluan disvastigon de Esperanto en nia lando.

La valoro de tiu verko tamen konsistas ne nur en tio. Unika laŭ sia ideo, laŭ abundo de fakta materialo, sin bazanta sur solidaj principoj, la libro — post forigo de tekstoj destinitaj antaŭ ĉio por la bulgara publiko, dank al majstra publicista stilo, prezentos sendubne intereson por la neesperantista publiko ankaŭ en aliaj landoj. Do, mi rekomendas priensi la demandojn pri eldono de la libro en Esperanton kaj ankaŭ pri ĝia eventuala traduko en aliajn naciajn lingvojn.

**Julian Modest, „Mistera lumo“.**  
Hungara Esperanto-Asocio. Buda-  
peŝto 1987, Formato: 14,5×20 cm.  
Paĝoj: 90, Prezo: 2.70 lv.

La novan libron de Julian Modest mi komencis legi senpacience — miaj pensoj tuj reproduktis la tutan paletaron de plezuroj, kiujn mi travivis dum la legado de „La Ora Pozidono“, „Maja pluvo“ kaj „Ni vivos!“ Tiam mi konstatis, ke en la Esperanta literaturo aperis nova, tre originala talentulo.

„Mistera lumo“ estas granda paŝo antaŭen en la verkaro de Julian Modest, ĝi estas libro-evento.

La 19 noveloj jam aperis en diversaj revuoj, sed, kolektite, ili sonas novmaniere, kiel partoj de unu tuto, kiun karakterizas la ĉefaj vortoj de la Modest-verkaro: milda lirikeco, atentokapta rakontmaniero kaj simpla, tamen nuancorika stilo.

Por Julian Modest tre grava estas la emocia efiko de lia verkaro. Li kvazaŭ ĉiam konsideras la vortojn de Leo Tolstoj: „... Revenigi en sin mem la iam travivitan senton kaj per movoj, koloroj, sonoj, bildoj, vortoj transdoni ĉi tiun senton tiel, ke la aliaj ankaŭ travivu la saman senton — jen en tio konsistas la aktiveco de la arto.“

En la noveloj de Julian Modest

mankas komplika intrigo, mankas konsternaj temoj, sed ili abundas je psikologiaj priskriboj de plej fajnaj animtravivaĵoj de la herooj. Estas ankaŭ iuj detaloj, pri kiuj la sperta leganto nepre atentus. Temas pri detaloj, kiujn la verkisto atingas per talpe persista laboro — ili estas tio, kion oni nomas beletra tekniko: tavoliĝo de polifonie konstruitaj motivoj, subakva fluaĵo de konfliktaj temoj en la dialogo, majstra bildeca priskribo de la pejzaĵoj, belegaj gvidmotivoj, brilaj finaĵoj...

En la plimulto de la noveloj estas io nefindirita. Kaj ĝi ne estas hazarda, nek esprimas ian artefaritan kaj pretendeman komunikemon. Ĉi tiun apartecon mi nomus antaŭsenton pri respondo. Julian Modest kvazaŭ deziras provoki la leganton skribi „la postparolon“ pri la vortoj diritaj de la aŭtoro, konfirmi aŭ refuti ilin, sed nepre esprimi sian opinion. Unu el la plej klare esprimitaj ecoj en la verkmaniero de Julian Modest estas la majstra uzado de la lingvo. Li brile posedas Esperanton dank' al sia sistema studado de la klasikuloj kaj, nature, dank' al sia tre freŝa, tre originala talento kaj uzas ĝin kun envidinda libereco, kun virtuozita eleganco.

**Venelin MITEV**

kastelo kun preĝejo, kun granda ĝardeno kaj sportejo. Nun ĝi estas faka mezlernejo, en kiu lernas kaj loĝas ĉirkaŭ 5000 lernantoj el la tuta lando. Proksime de ĝi levigas kelkaj modernaj konstruaĵoj — fakultatoj de la Supera Inĝeniera Instituto. La loĝantaro de Hihon fieras pri sia eminenta samurbano Jovellanos (Hovejanos) — verkisto, sociaganto kaj publicisto, verkinta en la komenco de la 19-a jarcento. Li faris multon por la kultura levigo de siaj samurbanoj. La estraro de la esperantista societo preparis libron „Astura bukedo“ — kolekto el verkoj de Gaspar de Jovellanos kaj de aliaj poetoj kaj verkistoj de Asturio, tradukitaj en Esperanton.

Mia amiko Hulo preparis por mi rican programon por fratarigado de la urbo kaj de ĝiaj ĉirkaŭaĵoj, kaj kune kun la prezidanto Santiago Mulas organizis kelkajn interesajn renkontigojn kun geesperantistoj el Hihon kaj el la najbaraj urboj. Kune kun li mi vizitis kunvenon de geesperantistoj en la regiona urbo Oviedo, kie mi parolis pri Bulgario kaj pri la esperantista movado en nia lando. Mi vizitis ankaŭ Adonis Gonzales Meana, redaktoro de la regiona revuo „Heleco“, kiu tiutempe kuracis sin en malsanulejo pro grava akcidento.

Mi ĉeestis lecionon en infana kurso gvidata de Arguelles (la gefinfanoj estis 12—14-jaraj). Mi pa-

rolis antaŭ ili pri Bulgario kaj pri la fakultativa instruado de Esperanto ĉe ni, kio provokis multajn demandojn. Ankaŭ dum kunveno de la geesperantistoj, mi parolis pri Bulgario, pri mia urbo Gabrovo kaj pri instruado de Esperanto en nia lando. Ili anticipis konis miajn artikolojn en revuo „Heleco“ — pri la osmana kvinjarcenta ĵugo kaj pri la Aprila Ribelo en Bulgario, pri kultura kaj muzika historio de Gabrovo kaj ankaŭ Gabrovajn anekdotojn, tradukitajn en Esperanto. Miaj kunparolantoj montris viglan intereson al Bulgario, aparte pri senpaga instruado kaj sanprotektado, pri la karaktero de gabrovanoj kaj pri ilia spremo, pri la Domo de Humuro kaj Satiro kaj ĝiaj arandoj.

Post du tagoj Nikolas Pilonso — prezidanto de la esperantista societo en la najbara havenurbo Aviles, per sia aŭtomobilo kondukis nin al la Domo de Kulturo, kie okazis renkontigo kun tieaj geesperantistoj. Atendis min agrabla surprizo: en la apuda halo estis ekspoziciitaj 25 pentraĵoj de junaj bulgaraj pentristoj, inter kiuj elstaris du pentraĵoj de Ljubomir Jordanov. La ekspozicio estis inaŭgurita de la bulgara ambasadoro en Madrido Ivan Nedev kaj de la konsulo pri kulturaj aferoj Ilija Kondov. Post la oficiala parto oni prezentis min al la ambasadoro kaj la konsulo kaj



En samideana rondo

ni interparolis. Ivan Nedev estas mia samregionano — li estas naskita en Sevlievo. Ili gratulis min pro mia bonrezulta laboro per Esperanto favore al Bulgario.

Post kelkaj tagoj s-ro Ĉapoli, gvidanto de Esperanto-kurso en la najbara havenurbo Navia, intervjuis min. Liaj ĉefaj demandoj rilatis la fondon, historion kaj nuntempon de Bulgario kaj de mia naskiĝurbo, la disvastigon de Esperanto en nia lando. La intervjuo estis

## BRAVE, BULGAROJ!

Oni<sup>1</sup>plenrajte povas aserti, ke unu el la agrablaj surprizoj en la kultura programo de la 55-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj en Varsovio estis la sinprezento de la Ĉambra Ĥoro por E-Kantoj ĉe la Popola Leĝejo de Blinduloj „Louis Braille“ kun ĥoresto Marko Markov.

La 2-an de aŭgusto j. k., antaŭtagmeze, la ĥoro malfermis la kongreson kun plenumo de la esperantista himno „La Espero“, kaj la saman vesperon ĝi aperis antaŭ la publiko kun sia oficiala koncerto. La varia programo enhavis verkojn de okcidenteŭropaj klasikaj kaj romantikaj aŭtoroj, sovetaĵn kantojn kaj kantojn de bulgaraj komponistoj verkitaĵ laŭ popularaj motivoj. La tekstoj de kvin el la kantoj estas tradukitaĵ en Esperanto de la eminenta aktivulo de la bulgara E-movado kaj granda amiko de la blindaj bulgaraj esperantistoj Asen Grigorov. Kortuŝe kaj milde sonis „Printempa voko“ de Ludwig van Beethoven, „En nokta ĥoro“ de Johannes Brahms, „Ho, Normandia“ de Berlioz (la lasta plenumita de la virina konsisto de la ĥoro).

La emociie plenumitaj bulgaraj kantoj ege plaĉis al la alilandaj aŭskultantoj. Kiel bonegaj plenumantoj distingigis niaj solistoj Stefan Paskulov, Sultana Mineva kaj Veska Angelova. Kulmina momento en la koncerto estis la plenumo de „Haleluja“ el la oratorio „Mesio“ de Georg Friedrich Handel. Ravita de la plenumo, la publiko longe kaj entuziasme aplaudis ĥorestron kaj ĥoristojn. En la halo aŭdigis krioj: „Brave, bulgaroj!“ kaj „Bis!“ Laŭ deziro de la kongresa estraro nia ĥoro fermis la kongreson per „Haleluja“ kaj „Kanto pri la paco“. Kiam la prezidanto de la konkluda kunsido anoncis, ke kantas la bulgaroj, en la halo ekestis ĝoja vigligo.

Dum la kongreso ni ĥoristoj estis objekto de aparta atento, ĉe renkontiĝoj kun ni la delegitoj prezantis

tre flatajn opiniojn pri nia arto, interesiĝis pri nia laboro. Jen al via atento kelkaj iliaj eldiroj:

Andzey Bartynski, membro de la Unuiĝo de Literaturistoj kaj de la Unuiĝo de Polaj Muzikagantoj:

„Mi volas substreki, ke la partopreno de la bulgaraj kantistoj aldonis festan etoson al la internacia kongreso en Varsovio, estis por mi granda, ravanta travivaĵo. Artisma, muzika agado inter la nevidantaj bulgaroj estas aparaĵo estiminda en la tutmonda movado de blinduloj... Konklude mi volus diri kelkajn vortojn pri la basulo Stefan Paskulov. Laŭ mi, li posedas bonegan voĉon. La fakto, ke li plenumas la solo-partion en „Haleluja“ de Hendel parolas per si mem. Mi bondeziras al la ĥoristoj pli ofte aperi antaŭ internacia publiko“.

D-ro Aldo Grassioni, lektoro de historio kaj filozofio, prezidanto de la opera societo en urbo Ancona, Italio:

„Mi ĝojas, ke mi havis la eblecon aŭskulti ĥoron de bulgaraj blindaj esperantistoj. Ili plenumis tre interesan programon, manifestante bonegan teknikon kaj voĉan preparitecon. Mi opinias, ke la ĥoro havas grandan kontribuon por evoluo de la muzika kulturo en esperantistaj medioj kaj vekas profundan intereson al la diversaj muzikaj stiloj kaj tradicioj. Ĝi multe kontribuis ankaŭ por la sukcesa laboro de la kongreso, pli ĝuste por la kultura programo, kiu tie ĉi, en Varsovio, estis konvena kaj riĉa. La ĥoro per siaj kantoj estis vera heroldo de paco kaj arto“.

Per sia ekskluzive sukcesa sinprezento en Varsovio, la ĥoro sendube defendis sian rajton de ekzistado. Esperigaj estas ankaŭ la perspektivoj por ĝia estonta laboro. Aperinta por kontentigi jam de longe aperintan kulturen bezonon de la nevidantaj esperantistoj, la ĥoro pruvis, ke al ĝi ne mankas fortoj por plenumi sian noblan mision.

**Geto VELKOV**



Sur la fono de haveno „Tazones“ en Asturio.

emisiita pere de la urba radiostacio.

Dum la sekvanta renkontiĝo kun geesperantistoj en Hihon s-ro Arguelles projekciis filmon pri la Uni-

versala Kongreso de esperantistoj en Pekino en 1986 kaj pri la ekskursoj al Ŝanhajo, Hongkongo kaj la Granda Ĉina Muro.

Kune kun mia gastiganto mi faris unutagan ekskurson al la monaĥejo Kovadonga, kiu situas en valo ĉirkaŭita de altaj rokaj montopintoj, kovritaj per neĝo.

Returnen al Hihon ni veturis laŭ apudmara ŝoseo, kiu malkovris belegajn pejzaĝojn: verdaj montoj malsupreniĝas al la maro, „frizita“ de pitoreskaj golfoj kaj malgrandaj strandoj. Ni haltis en fiŝistaj vilaĝoj, en popola restoracio ni tiunkis de la fama astura cidro<sup>1</sup> kaj manĝis frititan freŝan fiŝon kaj nacian manĝaĵon — fazeolon kun viando kaj kolbasetoj.

S-ro Arguelles tre agrable surprizis min: dum la antaŭlasta kunveno estis prezentita filmo pri la Universala Kongreso de Esperanto en Varna 1978, kiun partoprenis granda grupo da esperantistoj el Hihon kaj el aliaj hispanaj urboj. Li montris kadrojn de ilia ekskurso al Sofio, V. Târnovo, Gabrovo, la muzeo Eŝar, montopinto „Ŝipka“, Kazanlak kaj Roza Valo. Al mi estis starigitaj demandoj pri la kreo de Kiri-

lica-alfabeto kaj ĝia disvastigo, pri la kreado de la riĉa mezepoka literaturo kaj ĝia rezisto al la osmana kaj greka influo dum 500-jara jago.

Mi estis emociita rigardante fotojn kaj materialojn de ekspozicio aranĝita en 1981 en Hihon, dediĉita al la 1300-jariĝo de Bulgario, per materialoj senditaj de Elena Kovaĉeva, de mi kaj aliaj bulgaroj.

Dum mia lasta renkontiĝo kun la geesperantistoj el Gijon ni faris komunan memorfoton. Mi ornamis la brustojn de la ĉeestantoj per nia „Martenica“ kaj rakontis al ili pri tiu nia popolokutimo.

Mi estas feliĉa, ke en Hispanujo mi renkontis tiom multe da amikoj de Bulgario, kiuj montris viglan intereson al mia patrujo.

Mi denove konvinkigis pri la grandaj eblecoj, kiujn Esperanto disponigas al ni — vizitadi fremdajn landojn, starigi senperajn kontaktojn kun homoj el diversaj medioj kaj amikiĝi kun ili, esti patriota informanto pri la historio kaj la atingoj de nia popolo en la konstruado de socialismo en nia patrujo.

*Hihon — Gabrovo, aprilo, 1987*

<sup>1</sup> Cidro — pomvino

## AVANGARDO DE XXI JARCENTO

La homaro alproksimiĝas al la fino de XX jarcento. Estas nature, ke oni pensu pri la estonto, pri la vivo en la XXI jarcento. Gajiga estas la fakto, ke en junularaj arandoj ĉiam pli ofte ĉeestas Esperanto.

Laŭ invito de Pola Studenta E-Komitato (PSEK) ĉe la Asocio de Polaj Studentoj (APS), de la 1-a ĝis la 14-a de septembro 1987, en Śródborów, proksime de Varsovio, en la Centra Kursejo de APS mi instruis Esperanton dum arango nomita „Avangardo de XXI jarcento”. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 40 polaj gestudentoj.

— Kio estas „Avangardo de XXI jarcento?” — tiun demandon mi starigis al Urszula Kurowska, unu el la ĉeforganizantoj de APS.

— Ĝi estas arango, kiun partoprenas la plej bonaj gestudentoj el tuta Pollando — laŭreatoj de konkursoj, stipendiuloj de la Ministerio de Scienco kaj sciencstipendiuloj de APS. Ĉi-jare ĝi okazas jam trian fojon. Vi scias, ke PSEK agadas enkadre de APS. Do, ni konas ĝian laboron kaj ni decidis provi kiel efikas Esperanto en simila arango. Ni konstatis, ke ĝi sin prezentis tre bone. Ĉi-jare ni eksperimentis, kaj ni certe daŭrigos la eksperimenton, ĉar ni jam vidis la elmontritan intereson al Esperanto.

La programo konsistis el du ĉefaj partoj — du E-grupoj, gvidataj de Jarek Parzyszek (Pollando) kaj Mariana Elenova (Bulgario) kaj kurso por laboro kun komputiloj. Estis intereso por mi kiom el tiuj „elitaj gejunuloj” preferas la naturan homan kontakton — pere de Esperanto, al la maŝina partnero — la tiel moderna kaj interesa komputilo. Fakte ili ĉiuj havis la eblecon partopreni ambaŭ kursojn. Bedaŭrinde, evidentiĝis, ke parto de ili tamen preferis resti nur ĉe la maŝinoj. La alia parto (por mia granda gojo — iom pli granda) havis la emon kaj intereson konatiĝi kun la Internacia Lingvo kaj partopreni la 14 lecionojn de Esperanto.

La arango povus esti iom pli bone organizita. Vere estis multe da programeroj (diversaj koncertoj, disko-fekoj, renkontiĝoj kun la ministro pri junularaj aferoj, ministro pri kulturo kaj arto kaj aliaj ŝtataj eminentuloj), sed tamen estis posttagmezoj, kiam ni simple enuis, se ne estus niaj amikaj E-renkontiĝoj. Ĉar pere de Esperanto ni amikiĝis tre rapide kaj ni volis esti kune.

Mi ŝatus rakonti momenton el mia restado en Śródborów, tre kortuŝan por mi. La 9-an de septembro, kiel kutime je la 9-a horo matene, mi komencis la lecionon. Sed strange, kelkaj personoj el mia grupo forstis. Tamen je la preciza horo mi skribis sur la tabulo „Leciono №. . .”, la daton kaj la unuan frazon de



la leciono: „Hodiaŭ estas la nacia festo de Bulgario”. Post unu-du minutoj la pordo malfermiĝis kaj eniris la ĉambro la forestantoj. Unu el la knaboj portis grandegan bukedon da rozoj kaj alproksimiĝis al mi kun la vortoj: „Nia kara Mariana, okaze de la nacia festo de via patrolando ni tutkore bondeziras. . .”. Ĉiuj ekstaris kaj post la salutvortoj ekkantis la salut-kanton „Cent jarojn vivu vi”. Mi estis feliĉa kaj tre kortuŝita. . . Post la leciono ni longe interparolis pri Bulgario, pri nia popolo, kutimoj, historio, nuntempa vivo.

Fine de la kurso estis prezentita teatraĵeto en Esperanto preparita de la gekursanoj — tre interesa kaj sprita prezento de momentoj de ĉiutaga familia vivo. Kaj ankaŭ, kiel diris unu el la ĉeforganizantoj-neesperantistoj dum la adiaŭa vespero: „Tuj oni vidas, kiuj estas la esperantistoj inter ni”. Jes, la gestudentoj dum 14 lecionoj fariĝis esperantistoj, volis esti ĉiam kune — dum lernado kaj amuzado, fariĝis veraj geamikoj. Mi forte esperas, ke ili pliriĝigos per sia aktiva ĉeesto la polan kaj eĉ la internacian junularan E-movadon!

Mariana ELENOVA



### NOVAJ ADEPTOJ EN BLAGOEVRAD

Laŭ iniciato de ing. Akulina Stefanova — kursgvigiantino en la Supera Pedagogia Instituto en Blagoevgrad, estis organizita E-kurso, en kiu ankaŭ ŝi mem lernas la Internacian Lingvon. Sur la foto: ing. Stefanova (la lasta, sidanta dekstre) kune kun siaj studentoj-esperantistoj.

## Forpasis pioniro de BuLEA

Maldensiĝas la vicoj de la veteranoj-esperantistoj. Forpasis en aŭgusto ĉi-jare ankaŭ la pioniro de la laborista Esperanto-movado Ljubomir Ognjanov-Rizor, pensiita profesoro de germana literaturo en la Sofia Universitato. „Rizor“ estis lia literatura pseŭdonimo kaj li estis konata al la vasta publiko per tiu ĉi nomo. Li naskiĝis en familio de progresemaj gepatroj. Vasil Ognjanov — lia patro, estis profesia kemiisto. Ljubomir (aŭ kiel karese ni nomis lin Ljubĉo) jam en la gimnazio bonege konis la germanan lingvon, kiun li lernis sub la influo de sia patro. Mi jam estis studento, li — lernanto en la superaj klasoj de la Sofia knaba gimnazio. Ni ambaŭ estis aktivaj membroj de la ĉefurba laborista esperantista societo. Kiam ni konatiĝis en 1928, li jam estis perfekta esperantisto.

Ljubĉo estis ĉiam ridetanta, bonhumora, energia, kapabla junulo kun vastaj intereso. Li korespondis aktive kun sovetaĵ esperantistoj kaj publikigis en la soveta gazetaro materialojn pri la stato kaj bataloj de la bulgara laborista klaso, kontraŭ la barbaraĵoj de la faŝista diktaturo. Li posedis produktivan plumon, klaran stilon, scipovon satiri siajn korespondantojn per konvenaj konkretaj ekzemploj. En mia bulgarlingva libro „La Ruĝa Torĉo“ (Profizdat, 1986) mi rakontis pli detale pri tiu fakte ĵurnalista agado de Ljubĉo, kiu tiam subskribis siajn materialojn por la soveta gazetaro per pseŭdonimo Gol kaj sendis ilin al la adresoj de siaj sovetaĵ esperantistaj amikoj.

Mi ĉiam miris pri la inteligenteco kaj agemo de mia pli juna amiko. Tre iniciatema, li rapide orientiĝis kaj okupiĝis pri novaj aranĝoj. Eksciinte, ke mi pro manko de tempo ne povos daŭrigi la tradukon el Esperanto en la bulgaran de la fantasta romano „La ruĝa stelo“ de la rusa revolucia verkisto A. Bogdanov, li tuj transprenis tiun

laboron, proponis la tradukon al ĉiutaga laborista gazeto „Eĥo“ kaj publikigis ĝin poparte. Tiu lia iniciato estis ne nur utila kiel interesa legaĵo pri la maldekstre orientita publiko, sed ankaŭ sukcesa propaganda paŝo favore al Esperanto. Miloj da legantoj jam ĉiutage legis tradukon el Esperanto kaj tio per si mem parolis pri la kvalito de la Lingvo Internacia. Eble la novaj esperantistaj generacioj ne tre alte taksus tiun meriton de Rizor, sed kompare kun la tiama epoko (tiam ni — proletaĵ esperantistoj — faris unuajn paŝojn en la propagando de Esperanto en proletaĵ medioj), tiu fakto, ŝuldata al Rizor havis gravan pozitivan signifon.

Ljubĉo partoprenis aktive la laboristan movadon en Sofio. Alivestita, por ke oni ne forigu lin el la gimnazio, li vizitadis laboristajn kunvenojn, precipe junulajn, partoprenis ankaŭ stratedemonstraciojn. Feliĉe, li sukcesis brile fini la gimnazian kurson kaj poste studis en la universitato germanan filologion. Krome, li ellernis ankaŭ anglan lingvon, tradukis multajn verkojn de Ŝekspiro kaj havigis al ĉiu el ili literatur-kritikan antaŭparolon. Li unua en la bulgara literaturo faris tre valoran analizon de la fama tragedio „Hamleto“ en antaŭparolo al sia traduko.

Ne hazarde li fariĝis scienculo-esploristo de germana literaturo en la Sofia Universitato. Krom profesoreco kaj doktoreco pri filologiaj sciencoj, li estis distingita per la alta titolo „merita aganto de la kulturo“.

Li tre frue montris intereson al la literaturo. Lia ŝatata okupo estis la literatura kritiko. Kiam laŭ decido de CK de BKP estis fondita la maldekstra literatura gazeto „Relef“ (mallongigo de „Laborista Literatura Fronto“), Ljubĉo estis en la iniciata grupo de la redakcio. El tiuj 6—7 pioniroj nun vivas nur 2 personoj.

Ljubĉo estis unu el la organizantoj kaj tre aktiva partoprenanto en la

tiel nomata PEK (Proleta Esperanto-Korespondado). PEK faris multon por propagandi per la neesperantista maldekstra kaj demokrata gazetaro favore al la klasbatalo.

Ljubĉo estis en konstanta leterliĝo kun la ĉefrespondeculo de tiu PEK-servo en tiama Germanio — k-do Otto Bäßler, loĝanta en Lejpcigo.

Post la liberigo de nia lando en 1944 k-do Rizor estis ege okupita per scienca kaj literatura laboro kaj ne povis aktive agadi en esperantista medio. Sed li ĉiam interesiĝis pri nia agado kaj laŭ siaj ebloj, en la medioj de scienculoj kaj literaturistoj, li helpis nian propagandon. Li havis grandan stokon da korespondantoj, kiun li transdonis al la Asocio, sed bedaŭrinde, ili perdiĝis pro neglektado de la persono, al kiu estis transdonitaj. Rizor kelkfoje demandis min ĉu estas retrovitaj liaj korespondantoj, sed mi ĉiam devis respondi al li negative. Li ne povis rememori la nomon de la estrarano, al kiu estis konfiditaj tiuj gravegaj korespondantoj.

Baldaŭ post la Naŭaseptembra revolucio en nia lando, por kies sukceso kontribuis ankaŭ Rizor, li estis oficigita en la sindikata eldonejo kiel redaktoro kaj tradukisto el germana, rusa kaj angla. Post kelkaj jaroj li estis invitita fariĝi universitata lekciisto pri germana literaturo kaj tre fruktodone eklaboris ankaŭ sur universitata nivelo.

Forpasis talenta persono kun grandaj meritoj al la laborista Esperanto-movado. Li naskiĝis la 16-an de majo 1910 kaj preskaŭ dum ses jardekoj digne servis al la plej progresemaj idealoj de nia epoko, restinte dum sia tuta konscia vivo arda adepto de la bulgara-soveta amikeco.

Nikola ALEKSIEV,  
esperantista veterano



## JUBILEAJ SOLENAĴOJ

### VELIKO TĀRNOVO:

La 26-an de septembro j. k. en la salono de la Komunuma Domo en nia historia urbo okazis jubilea solenaĵo lige kun la 100-jariĝo de Esperanto kaj la 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio. Oficialaj gastoj estis reprezentantoj de la Urba Konsilantaro, de la Komsomolo, Filatelista Societo, Societo de Amikoj de la Muzeoj, prof. d-ro Georgi Dančev — rektoro de la Universitato „Kiril kaj Metodij“, docento Margarita Kanazirska — estraranino de la Asocio de Bulgara Sciencistoj.

La solenaĵon malfermis Olga Cankova — prezidantino de E-societo „Lumo“. Ŝi parolis pri la kulturaj tradicioj de la urbo, kies intelektularo akceptis Esperanton jam en 1888. Dank' al la iniciatemo de lokaj pioniroj de la E-movado, en aŭgusto 1907 okazis la Fonda Kongreso de Bulgara Esperantista Ligo (nun Bulgara Esperantista Asocio).



Hristo Gorov, — membro de la Buroo de CE de BEA, faris solenan paroladon pri la 100-jara historio de la Internacia Lingvo Esperanto. Li memorigis pri la riĉa literatura E-heredaĵo kaj prezentis la evoluon de la E-movado en Bulgario, kies tradicioj entuziasmigis la nunan bulgaran esperantistaron.

Prof. d-ro Kiril Popov — membro de la Buroo de CE de BEA, enmanigis jubileajn orajn medalojn kaj orajn insignojn de BEA al veteranoj, E-aktivuloj kaj al amikoj de Esperanto, interalie al prof. d-ro G. Dančev kaj al prof. Nikola Nikolov — prezidanto de la Filio de la Asocio de Bulgara Sciencistoj.

Junaj esperantistoj-gelernantoj el Sofio prezentis literaturan-muzikan programon: Konstantin Pavlov deklamis versaĵojn de Kalocsay, la kantgrupo „Verda Stelo“ el IV lernejo „N. J. Vapcarov“ kantis en Esperanto multajn kantojn.

Antaŭ la jubilea arango en la urba E-oficejo okazis renkontiĝo de E-estraranoj el Sofio kaj Veliko Tarnovo. Oni interŝanĝis sperton pri la propagando, instruado kaj praktika uzado de Esperanto.

O. C.

### VARNA:

La 3-an de septembro ĉi-jare en klubo „Albatroso“ la sekcio de esperantistoj-veteranoj „Mois Levi“ celebris la 100-jariĝon de Esperanto.

Varnaj esperantistoj-veteranoj ne povus elekti pli konvenan patronon de sia sekcio. Kiu estas Mois Levi? Homo firma kaj pura kiel diamanto. Naskita en malriĉa multnombra familio, li pro sia kontraŭfasiŝma agado estas eksigita el la gimnazio kaj rezignante pri junecaj revoj kaj persona vivo, frue alpaŝas la vojon de la komsomolaj kaj partiaj funkciuloj. En la fondita en 1936 E-societo li estas unu el la plej aktivaj anoj. Senkompromise fidela al la partio kaj al la popolo, Mois Levi sukcese plenumas ĉiujn komisiitajn al li taskojn. Arestita, kruele turmentita, li mortis en la policejo.

Laŭ invito de la societa prezidantino Evdokia Čečeva, ĉeestis s-ino Maria Levi el Israelo, fratino de la patrono de la sekcio, Ingrid Gerhardt el Schwerin, GDR, kaj d-rino Jordanka Popova el Jambol. S-ino Maria Levi salutis la ĉeestantojn, profunde tuŝita ke la bulgaraj esperantistoj ne forgesis ŝian fraton. Si, bedaŭrinde, ne estis informita pri la Esperanto-movado en Israelo, sed sciis, ke en Tel-Aviv ekzistas strato „D-ro Zamenhof“.

Stanjo Velikov, prezidanto de la urba E-societo, raportis detale pri sia partopreno en antaŭkongresaj aranĝoj en diversaj urboj en Pollando kaj pri la grandioza jubilea kongreso en Varsovio. S-ino Ingrid Gerhardt rakontis pri la vivo kaj agado de la Esperanto-societo en Schwerin. D-rino Popova informis la kunvenon pri la 6-a Internacia Medicina Konferenco en Krakovo. Georgi Cvetkov tre emocie rakontis siajn impresojn pri la kongreso. Docento Georgi Dimov anoncis, ke omaĝe al la 100-jara jubileo de Esperanto li gvidos senpage refreŝigan E-kurson.

D-rino Jordanka POPOVA

### SOFIO:

La 28-an de oktobro en la Sofia Kulturdomo „Emil Sekerĝiĵski“ okazis solenaĵo dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto. La feston organizis la Urba Estraro de BEA kaj la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“.

En sia mallonga parolado la prezidanto de UE profesoro d-ro Kiril Popov skizis la historion de la Lingvo Internacia. Sekvis honorigo de veteranoj-esperantistoj per la jubilea medalo „100 jarojn Esperanto“.

La duan parton de la festo konsistigis koncerto el „serioza“ kaj moderna muziko. Unue elpaŝis la Horo de Sofiaj Esperantistoj kaj kelkaj amatoraj deklamantoj. La akustika estrada grupo „Medikus“ kaj la roĉ-kantgrupo „Era“ (Erao) per siaj kantoj, adresitaj al la plej juna esperantista generacio, ravis la ĉeestantojn. La koncerto finiĝis per plenumo de kanzonoj far la konata E-kantisto Mišo Zdravev.

La solena kunveno de UE de BEA estis vera festo de la E-arto.

V. B.

### RAZGRAD:

La 3-an de oktobro ĉi-jare estis organizita renkontiĝo de veteranoj-esperantistoj el la distrikto de Razgrad, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto, 150-jara datreveno de la naskiĝo de Vasil Levski kaj 70-jariĝo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

Radkaŝtojanova — prezidantino de E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“ salutis la geesperantistojn. Junaj esperantistoj prezentis literaturan-muzikan programon. La renkontiĝo okazis en vilaĝo Pobit kamāk. La partoprenantoj havis eblecon trarigardi la interesan etnografian komplekson kaj viziti la aleon „150 jaroj de la naskiĝo de Vasil Levski“. Ili eksciis multe da faktoj pri la historio de la bela vilaĝo Pobit kamāk kaj pri Vasil Levski, la apostolo de la bulgara nacia revolucio.

Radka STOJANOVA

## NACIA POŝTISTA KONFERENCO

La 9-a Nacia Scienc-Praktika Konferenco de la Poŝtista kaj Telekomunikista Esperanto-sekcio, dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto kaj 70-jara datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, okazis la 24-an kaj 25-an de oktobro j. k. en urbo Velingrad.

Gian laboron partoprenis pli ol 30 delegitoj-poŝtistoj kaj telekomunikistoj el la tuta lando kaj gastoj de la loka Esperanto-Societo „Stojo Kalpazanov“.

Prezentitaj estis jenaj raportoj: „100-jara jubileo de Esperanto kaj IPTEA“ — de la prezidanto de la sekcio — Draguŝko Petrov; „La telematikaj servoj disponigas novajn komunikajn komplezojn“ — de ing. Georgi Stoilov — kandidato de la teknikaj sciencoj ĉe la Scienc-Esplora Instituto pri Komunikado; „Celoj kaj manieroj por renovigo de la komunikado“ — de Ivan Jordanov.

En la raportoj oni montris la evoluon de la komunikado en monda skalo kaj la enkondukon de la teknika progreso en nia lando per uzado de internacia sperto. Post la raportoj okazis diskutoj.

La konferencon salutis la ĉefo de la Poŝto en Velingrad Georgi Punev kaj la vicprezidanto de la loka Esperanto-societo Bojŝ Marinov.

Por la ĉeestantoj oni projekciis diapozitivajn de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio.

Dum la restado en Velingrad por la partoprenantoj en la konferenco estis aranĝita ekskurso tra la urbo. Ili konatiĝis kun la rimarkindaĵoj de tiu pitoreska altmontara ripozejo, vizitis la monumenton de la nacia heroino Vela Peeva, pereinta en la kruela batalo kontraŭ faŝismo, la Domon-muzeon „Vela Peeva“ en kvar-talo „Kamenica“ kaj la lagon de la loko „Kleptuza“ — Ĉepino.

D. P.

## RENKONTIĜO KUN „BE“-REDAKCIANOJ

Estiĝis jam tradicio la renkontiĝoj de la redakta skipo de revuo „Bulgara Esperantisto“ kun legantoj el Sofio. Ankaŭ ĉi-jare, en oktobro, la redakciaĵoj gastis al la Sofia Esperanto-Domo de Kulturo „Maksim Gorkij“ kaj havis eblecon diskuti kun sofiaj esperantistoj. En ĉeesto de la respondeca sekretario Lidia Raeva, de la redaktoro Maria Jankova kaj de la redakta komitato, la ĉefredaktoro Donĉo Hitrov rakontis pri la maniero de laboro en la redakcio, pri la karaktero kaj aspekto de la revuo. Li koncize skizis la planojn pri la estonta 1988 jaro kaj menciis kelkajn publikigendajn materialojn. Fine la ĉefredaktoro alvokis al aktiva partopreno en la abonkampanjo.

Sekvis multaj demandoj lige kun la enhavo de la revuo, al kiuj respondis D. Hitrov, M. Jankova kaj la membro de la redakta komitato Georgi Mihalkov. Ne mankis ankaŭ rekomendoj — la legantoj esprimis dezirojn, ke la revuo estiĝu ankoraŭ pli enhavoriĉa kaj interesa.

La renkontiĝo de la redakta komitato kaj la redakciaĵoj de „BE“ kun la legantoj el Sofio estas utila formo kontakti pli vastan publikon, ekscii ties opiniojn kaj interesojn, sincere pridiskuti la problemojn starigitajn al la redakcio. Ni kredas, ke la renkontiĝo instigos pli multe da esperantistoj aboni la revuon kaj sendi kontribuojn al ĝi. Samtempe ĝi certe pensigis la redaktorojn pri novaj formoj de informado, pri enkonduko de novaj rubrikoj ktp.

Veneta BALEVA

## GASTE AL BANKJA

La turistoj el la tuta mondo havas sian feston — ĉiujare en la lasta septembra dimanĉo. Ĉi-jare la dato de la festo estis la 27-a de septembro.

En tiu varma aŭtuna tago la esperantistoj-turistoj el Bankja ekskursis en Ljulin-monto kaj vizitis la lokon, kie nun oni konstruas la fontoŝtonon „100 jaroj de Esperanto“ kaj promenis laŭ la vojeto „Esperanto“.

Dum la festo parolis Boris Atanasov — prezidanto de la klubo de veteranoj-turistoj kaj esperantistoj. Gastis la E-poetino el Kievo Nadija Andrianova. Ŝi dividis siajn impresojn pri Bulgario kaj tralegis sian versajon „Bankja nokte“. La soveta esperantistino estis proklamita honora membro de la E-societo en Bankja.

B. A.

## SAMSORTANOJ SERĈATAJ

En la unua numero de „Bulgara Esperantisto“ (1987) estis publikigita mia adreso kaj la artikoloj „La homa spirito venkos“ kaj „Esperanto en mia vivo“. Spertinte la rilaton de sanuloj mi ne esperis, ke ties leteroj amase venos al mia adreso. Multaj monatoj pasis kaj mi miris, kial nek unu invalido reagis. Ĉu ĉiuj restis indiferentaj? Ja la dividita doloro duone malgrandiĝas.

Finfine venis la delonge atenda letero. El Latvio al mi skribis la gvidanto de Tutsovetia Korespondada Klubo de Invalidoj-Esperantis-

toj. Mi plezure tralegis la leteron, sentante la spiriton de bona samideano, kiu perfekte posedas Esperanton. La stilo kaj la mondkoncepto sugestis al mi estimindan maturon. Mi neesprimeble surpriziĝis, ke la aŭtoro estas apenaŭ 26-jara. Multaj el liaj samaĝuloj ankoraŭ troviĝas sur vojkruĉigo, kaj li organizis 140 personojn kun malfacilaj sortoj. Ĉu pro soleco li konsolidigas per laboro? Nel Similaj kialoj ne ekzistas. La edzino kaj la fileto sufiĉas, por ke Nikolaj Griŝin vivu feliĉe kaj trankvile sub la ombro de egoismo. Li preferas sindoneme

servi al la amikeco. Li serĉas samsortanojn el diversaj landoj. Certe iun tagon klubo „Konkordo“ estiĝos internacia. Kune ni pli sukcese defendus nian tro probleman lokon en la vivo kaj en la koroj. Eble niaj elsuferitaj veroj faros la homaron pli prudenta, pli justa, pli sobra.

Bondezirojn kaj salutojn al la klubanoj, strebantaj al konkordo. Se en Vi flamas la sama celo, bonvolu skribi al la adreso: USSR, Latvio — 229910, Ventspils, Rudzutaka 27-11 Nikolaj GRIŜIN.

Lilia NIKOLOVA,  
Razgrad — 7200,  
EPJB-7, Vh. 4, ap.22

# Leteroj de korespondamikoj

## HEROLDOJ DE AMIKECO

Estas rusa proverbo: „Pli bone oni havu cent amikojn, ol cent rublojn“. Forta amikeco ligas la ŝumenajn esperantistojn kun multaj geamikoj de la tuta Soveta lando. Unuigas ilin ne nur la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la komuna pagagado.

Tiu amikeco estas malnova, tradicia. Ĝi komenciĝis jam dum la jaroj, kiam la esperantistoj-revoluciuloj Avgust Popov, Ljuben Kaŝčev, Belčo Nikolov, Nikolaj Pârvanov, Canko Karaspasov korespondis kun laboristoj kaj vilaĝanoj el la unua en la mondo socialisma lando; kiam la nuna honora membro de BEA, la antifaŝisto Atanas Bojaĝiev, dank' al la helpo de sia progresema franca korespondanto, ricevis entuziasmajn leterojn de la soveta instruisto Miĥail Oĥotin. Poste li rakontas antaŭ siaj ĝelernantoj kaj iliaj laboremaj, sed malriĉaj gepatroj en la Omurtaga regiono pri la konstruado de la nova vivo en USSR. Kaj dum la plej nigraj jaroj de faŝismo, li kaŝas kaj konservas la ricevitajn de li revuojn „Ogonjok“, „Antireligiulo“, „Sennaciulo“, kiuj nun estas valoraj relikvoj de nia amikeco.

Neforgeseblaj restas la impresoj kaj rakontoj de familio Bojaĝiev, de Olga Gerasimova, Veska Dragostinova, Bonka Pavlova, vizitintaj la Sovetan landon kaj renkontiĝintaj kun siaj geamikoj el Moskvo, Herson, Riga, Kiev.

La laboristo el la uzino por prilaborado de aluminio Ilija Andreev kiel trezoron gardas en sia hejma biblioteko grandan skatolon kun leteroj. Pasis jam 30 jaroj ekde kiam li partoprenis la unuajn bulgarajn brigadojn en Uzbekistano, sed ĝis nun li havas tie multajn kaj sindonajn amikojn.

Kiel plej atendataj gastoj alvenas en la hejmon de Cvjatkto Stojanov la leteroj de la maljuna jam bolŝeviko, komsomola kaj sindikata aganto Miĥail Casovitin el la malproksima Burjata urbo Petrovsk-Zabajkalskij. Cvjatkto Stojanov korespondas ankaŭ kun la televida inĝeniero Abdurahman Jumusov el Mahačkala, la instruistino Viktoria Cetova el Herson, ing. Al. Vajsberg el la nova urbo Monĉegorsk — Murmanskaja distrikto, kie la suno dum 6 monatoj ne malaperas kaj poste dum 6 monatoj estas nokto.

Iliana Andreeva havas interesan korespondadon kun la instruisto Genadij Motčev el vilaĝo Kuiri — Hersona regiono. Si kolektas kaj sendas al li materialojn pri la rusa-turka milito.

Kun soveta esperantistoj korespondas ankaŭ Tanja Angelova, la lernantino Galja Stojanova, Ĥristo Tonev, Ivan Smokov kaj multaj aliaj. Sinceran amikecon kaj varmajn bondezirojn oni trovas en la leteroj de ŝumenaj kaj sovetaĝes esperantistoj. Korespondado, kiu portas sinceran ĝojon!

Cvjatkto TODOROV

## EN AMIKA LANDO

La ĉi-jara jam tradicia E-semajno POSET'87, okazinta fine de aŭgusto en la bela historia urbo Potsdam (GDR), estis dediĉita al la 100-jara jubileo de Esperanto.

Neforgeseblaj restas por la 28 bulgaroj el Sumen, Preslav kaj Ruse la tagoj, travivitaj en bela tendaro situanta en natura arbarparko, apud pitoreska lago ĉe la rivero Havel, kune kun la pli ol 70 partoprenintoj el 7 landoj. La organizantoj proponis riĉan kaj interesan programon: ekskursoj en la ĉefurbo de GDR Berlino festanta sian 750-jariĝon, kaj en la historia Brandenburg, ŝippromenado laŭ la rivero, orgenkoncerto, lumbildprelegoj. Kaj la vespero dediĉita al GDR, USSR, Pollando, CSSR, Bulgario, transformiĝis en kortuŝan esprimon de amikeco. Profundajn impresojn

lasis ĉe ni pro siaj beleco kaj majesteco la mondfama palaco „Sanssouci“ kaj „Cicilienhof“, kie estis subskribita la Packontrakto post la fino de la Dua Mondmilito. Dum la tuta semajno nelacigeblaj motoroj de ĉiuj arangoj estis la ĉiam helpema kaj entreprenema Brigitte Raab, la ĉiam zorgema prezidantino de la Distrikta E-estraro — Potsdam, Rosen Trenne kaj la ceteraj potsdamaj kaj aliaj GDR-aktivuloj.

Veturante hejmen, parto de la ŝumena grupo gastis en la ĝemelurbo Magdeburg. Ili konatiĝis kun la vivo de ĝiaj loĝantoj kaj trarigardis la riĉan E-ekspozicion, kiu estis aranĝita en la instruista sindikatdomo. Dum kunveno, organizita de la loka E-societo „Progreso“, la ŝumenaj esperantistoj renkontiĝis kun malnovaj geamikoj, rakontis al ili novaĵojn el Sumen kaj el nia lando ĝenerale. La prezidantino de DE — Sumen, Veska Dragostinova enmanigis al la aktivuloj M. Trenne kaj G. Endler, la bulgaran jubilean medalon „100 jarojn Esperanto“.

Cvjatkto TODOROV

## TRA LA GAZETARO

### EN SOFIO

Jurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (20. VIII. 1987) donis lokon al informo pri la koruso de instruistinoj-esperantistoj en u. Pazargik; En j. „Oteĉestven Front“ (18. VIII. 1987) aperis trikolurna artikolo „Esperanto rigardas al sia dua jarcento“ de Sava Dălbokov, prezidanto de BEA; Per la plumo de Cvetanka Venkova j. „Narodna Mladeŝ“ (5. VIII. 1987) informas pri lekcio de prof. Ĥristo Marinov dum la TEJO-kongreso en Krakovo; j. „Veĉerni Novini“ (1. X. 1987) publikigis artikolon „100 jarojn Esperanto“; Semjana sindikata ĵurnalo „Transporten Glas“ (30. IX. 1987) aperigis artikolon de Vera Stajner pri la bulgara esperantista fervojista movado; La ĵurnalista revuo „Bălgarski Ĵurnalist“ (N-ro 8, aŭgusto, 1987) donis lokon al granda artikolo „La esperanta ĵurnalismo“ de Maria Jankova.

### EN LA LANDO:

Jurnalo „Oteĉestven Zov“, Vraca (31. VIII. 1987) aperigis tutaĝan titolon „100 jarojn Esperanto“. Ĝi enhavas grandan artikolon de Bojĉo Mladenov, informon pri esperantista renkontiĝo sur insulo „Esperanto“ apud u. Orĵahovo, opiniojn de 4 eminentuloj bulgaraj kaj fremdlandaj pri Esperanto; En j. „Borba“ — u. Veliko Tărnovo (29. IX. 1987) Olga Cankova informas pri granda solenaĵo en Veliko Tărnovo dediĉita al la 100-jariĝo de Esperanto kaj 80-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio; j. „Sumenska Zarja“ — u. Sumen (12. VII. 1987) aperigis informon de Veska Peeva pri esperantista celebrado de la granda bulgara laborista gvidanto Vasil Kolarov; En j. „Narodno Delo“ — u. Varna (25. VII. 1987) aperis granda artikolo de Ilija Panajotov pri la 100-jara jubileo de Esperanto; j. „Balkansko Zname“ — u. Gabrovo (15. X. 1987) aperigis sur tri kolumnoj vojaĝnotojn de Bojana Prodanova pri ŝia gastado al esperantistoj el Hispanio kaj Francio; En j. „Dimitrovska Pravda“ — u. Dimitrovgrad (9. VII. 1987) Evgenia Vălcanova informas pri granda kunveno de ĝelernantoj el la loka mezlernejo „Ivan Vazov“ dediĉita al la granda publicisto-esperantisto Trifon Ĥristovskij; Sub rubriko „100-jarojn Esperanto“, en j. „Ĉepinec“, u. Velingrad (1. VII. 1987) aperis artikolo de la veterano Nikola Godev pri la E-movado en Velingrad; j. „Ĉapavski zov“ — u. Belovo (15. VI. 1987) publikigis grandan artikolon de Jordan Nikolov pri la centjara jubileo de Esperanto; Uzina ĵurnalo „Duma na Metalurga“ — Aluminia Kombinumo u. Sumen (27. VIII. 1987) prenis du artikolojn, tradukitajn pere de Esperanto el uzina gazeto de samfaka uzino en u. Szekesfehervar, Hungario.



## LA EVOLUANTAJ LANDOJ BEZONAS ESPERANTON

Parolante antaŭ la Internacia Konferenco pri Malmarmado kaj Evoluigo, ĉe la Domo de UN la 27-an de aŭgusto, d-ro Julius Manson, vica reprezentanto de UEA ĉe UN, alvokis al plia utiligo de la Internacia Lingvo Esperanto fare de la evoluantaj landoj. „Evoluantaj landoj aparte bezonas interŝanĝon de faka sperto kaj disdividon de teknika scio,” sed ilin ofte haltigas lingvaj diferencoj. Unujara studado de Esperanto flanke de ĉiuj koncernatoj eliminus tiujn barilojn kaj metus ĉiujn landojn sur egalan, sendiskriminacian bazon. La rimarkoj de d-ro Manson estis mallongigita versio de la referaĵo de UEA pri malmarmado kaj evoluigo, kiun oni pli frue distribuis al la konferencanoj, kaj kies teksto aperis en nia septembra Novajletero.

## LA AVANTAGOJ DE E-UZADO

„Esperanto kaj Internacia Kunlaboro” estis la temo de prelego la 8-an de septembro, kiun prezentis UEA-vicprezidanto Yoŝimi Umeda ĉe la Universitata Forumo, diskutgrupo por la stabanoj de la Universitato de Unuiĝintaj Nacioj, Tokio. Esperanto, rimarkis s-ro Umeda, kontribuas al novaj fakoj, kiel ekzemple komputila tradukado, kiuj havas grandan potencialon en la internacia kunlaboro. Li pritraktis praktikajn manierojn, laŭ kiuj Esperanto plibonigas internacian kulturan, komercan kaj scian interŝanĝon.

## KONFERENCO EKZAMENOS LINGVON KAJ KULTURON ĈE UN

„Lingvo kaj Kulturo en Internaciaj Organizaĵoj” estos la temo de la Sesa Internacia Konferenco pri Lingvo kaj Komunikado, kiu okazos ĉe 777 United Nations Plaza vendredon, la 11-an de decembro. La konferencon kune organizos la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo kaj la Traduka Fakoj de Unuiĝintaj Nacioj. La unutaga aranĝo esploras la efikon de lingvaj kaj kulturaj diferencoj ĉe komunikprocedoj ene de organizaĵoj kiel la sekretariato de UN, kaj en rilatoj inter ŝtatoj en la kunteksto de internaciaj organizaĵoj.

(El „Novjorka Novajletero”, oktobro 1987)

## RIĈA FONTO DE KORESPONDDEZIROJ

Unuan fojon en Moskvo kreiĝis memfinancata E-klubo. Mi, gvidanto de tiu klubo, eklaboris profesie kiel instruisto de Esperanto. Por havi salajron, mi instruos dum la jaro la lingvon en 6 grupoj (po 20–30 personoj en ĉiu), sume do al proksimume 120–150

personoj. 40 personoj jam fervore lernas la lingvon. Baldaŭ estos organizitaj novaj grupoj.

Mi petas E-instruistojn el diversaj landoj reklami la ĉi-suban adreson kiel riĉan fonton de koresponddezirantoj 14–60-jaraj. La intereso estas plej diversaj, sed dominas gestudentoj. Ankaŭ mi pretas kunlabori kun E-instruantoj kaj klubgvidantoj.

Nia adreso: Esperanto-klubo, Dom Kulturi,  
ul. Volhonka 13, Moskva, 117820,  
USSR.

Anatolo GONCAROV



La novaj esperantistinoj, kiujn vi vidas sur la foto, sub la gvido de Svetlana Pogorelaja (la staranta) sukcese finis la E-kurson. Ili deziras amike korespondi kun samideanoj el la tuta mondo. La dezirantoj korespondi skribu al la adreso: USSR, 252 035, Kiev-35, ul. Urickogo, d. 19, kv. 73, Pogorelaja Svetlana.

## ARTA SEMAJNO '88

Post la sukceso de la Metiejaj Kulturtagoj, kiuj okazis ĉi-jare en la urbo Halee, ni organizos similan aranĝon kun la nomo „Arta semajno '88” (de la 8-a ĝis la 15-a de majo 1988). Ni antaŭvidas ĉirkaŭ 150 partoprenantojn.

Per tiu aranĝo ni celas malkovri talentulojn kaj kapabli interesulojn pri kreado sur la kampo de kulturo kaj arto. Celgrupo estas junaj (kaj mezaĝaj) esperantistoj interesigantaj pri plastika arto (ekz. pentrado, litografio, linoleuma gravurado), figura arto (teatro, kabareto, dancado ktp.), muziko, literaturo kaj poezio kaj fotografado. La laborgrupoj havos tre bonajn teknikajn kondiĉojn en du junularaj klubejoj kaj en la profesia Centro por Plastika Arto. Vespere okazos interesaj kulturaj programoj. Dum unu tago estos tuttaga ekskurso al Naumburg kaj Freyburg. Kulmino de la aranĝo estos la publika prezentado de la plej bonaj rezultoj de la unuopaj laborgrupoj.

Informiloj por la aranĝo petu ĉe: Kulturbund der DDR Bezirksvorstand Esperanto PSF 161 Halle DDR — 4010





## DEZIRAS KORESPONDI

### BULGARIO

LIDIA MILOSEVA (31-jara, fraŭlino) — ul. Kolarovska 9, Sofio 1113 — kun ĉl, pri ĉt. Kolektas BK kaj PM.

### BRAZILIO

ALEKSANDRO CARNEIRO (25-jara) str. Sao Vicente de Paulo, S/N Santa Barbara-Bahia-Brazilo 44150 — kun ĉl, pri vojaĝoj, historio, popolaj kutimoj, naturaj sciencoj, piedmarŝado. Serĉas geesperantistojn, kiuj povas helpi al li dum lia granda vojaĝado tra la mondo per biciklo kaj piede dum 1988.

### SVEDUJO

NILS ALVAR EKSTEN (40-jara) — Skärålid, Leterkesto 780, S-260-70 Ljungbyhed, Suda Svedujo — kun ĉl, pri esperantaĵoj kaj materialoj pri E-movado en la tuta mondo, lige kun aranĝotaj ekspozicioj en 1988 kaj 1989.

### IRLANDO

BRENDAN O'DRISCOLL (52-jara) — 44, Ardara Avenue, The Donahies, Dublin 13 — pri leĝoj, muzikoj, turismo kaj Esperanto kun samaĝuloj el socialismaj landoj.

### KUBO

ALINA GLEZ VALDES — Ave 21/1601 Quivicán, Habana — pri ĉt, kun ĉl.

### ĈEHOSLOVAKIO

RADIM SURY (30-jara, teknikisto, sperta esperantisto) — Alšovo nám. 691/4, 708 00 Ostrava — Poruba pri ĉt kun ĉl. Kolektas PM, E-aĵojn.

BORIS DOZA — Kotovova 1839, Praha 5 — Stodůlky 155 00 — kun bulgaroj pri bulgara E-movado.

### POLLANDO

ZDYCH ANDRZEY (30-jara) — str. Sokola 13 m 2, 93-519 ŁÓDŹ — pri ĉt kun ĉl.

### SOVETUNIO

ERIKAS E. LAICONAS, SU-233000, Kaunas-C, Poste restante, Litovio, serĉas kontaktojn kun kolegoj el ĉl kaj speleo-organizaĵoj, (prefere esperantistaj) por recipoka utila kunlaborado kaj interŝanĝo de ĉio pri kavernoj kaj speleoagado. Bonvolu skribi Esperante, angle, bulgare, pole, ruse aŭ litove. Respondo garantiata.

## ENHAVO

### II La nova starto

- 1 Jubilea bilanco (Hristo Gorov)
- 2 Kvara sesio de AIS (Daniela Deneva)
- 3 Interlingvistiko kaj esperantologio (Detlev Blanke, Marin Băcev, Nedka Valjavičarska, Ryszard Rokicki)
- 5 Vraca: Du internaciaj simpozioj (Radi Bančevski, Ljubomir Trifončovski)
- 6 Neŭtraleco kaj toleremo (Maria Jankova)
- 7 Pri la neceso paroli Esperanton (Nikola Nikolov)
- 8 Ni recenzas (Venelin Mitev)
- 8 Sub hispana ĉielo (Bojana Prodanova)
- 10 Brave, bulgaroj! (Geto Velkov)
- 11 Juna esperantisto (Mariana Elenova)
- 12 In memoriam (Nikola Aleksiev)
- 13 Enlanda movado
- 14 Samsortanoj serĉataj (Lilia Nikolova)
- 15 Leteroj de korespondamikoj (Cvjetko Todorov)
- 15 Tra la gazetaro
- IV El nia leterkesto

## NI KONDOLENCAS

Por ĉiam forasis niajn vicojn sindonaj esperantistoj-aktivuloj:

La 72-jara TODOR KURTEV el Simeonovgrad — fondinto kaj multjara prezidanto de la loka E-societo „Trakia Lumo“.

DAMJAN PACEV, 95-jara el Plovdiv. Li dediĉis al la E-movado pli ol 50 jarojn kaj estis distingita per la arĝenta kaj la ora insignoj de BEA.

La 90-jara STOJAN MINČEV el v. Zahari Stojanovo, komunumo de Popovo. Ekde la fondiĝo de societo „Homeco“ en Popovo li estis ĝia membro. Modesta kaj bonkora, fidela kaj sindona al la ideo de Esperanto, li testamentis al la junaj esperantistoj sian imitindan ekzemplon.

GEORGI KRĀSTEV — 87-jara el Sofio. Li ĉiam estis fidela al la nobla porpaca ideo esperantista.

Niajn profundajn kondolencojn al la parencoj de la forpasintaj veteranoj.

„BE“

Ĉefredaktoro: Dončo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BĂCEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIHALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika arango: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan CALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fontida en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:  
„BULGARA ESPERANTISTO“  
Bul. Hristo Botev 97

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66  
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117



## KARAJ LEGANTOJ,

Viaj leteroj konstante flugas al ni. Emociitaj de diversaj faktoj kaj eventoj movadaj, vi rapidas dividi vian opinion kun la redakcio.

Ci-sube ni publikigas kelkajn el viaj lastaj leteroj.

„BE,

## MIA JAPANA KORESPONDANTO

En n-ro 10/1986 de „Bulgara Esperantisto“ mi komencis legi la vojaĝ-impresojn „Raporto el Eŭropa Esperantujo“ de prof. Joshiaki Mizuno el Japanio.

Mi legis ilin kun granda intereso kaj por la Nova Jaro 1987 mi sendis al li mian unuan leteron. Gratulon pro la interesaj artikoloj. Prof. Mizuno tuj respondis al mi kaj dankis pro mia saluto. Tiel komenciĝis nia tre regula korespondado.

Estas tre interese, ĉar liaj leteroj alvenas ege rapide — por dek tagoj el Japanio ĝis Polso Kosovo!

Tiel dank' al Esperanto ni konatiĝis—samideanoj el Bulgario kaj Japanio.

J.I.ATANASOV,  
prezidanto de societo „Frateco“,  
Polso Kosovo

## KIU ESTAS LA UNUA?

Estimata Redakcio,

En „Bulgara Esperantisto“ (3/87 p. 15), Petko Arnaudov informas, ke en Pazargik, en decembro 1986 estis inaŭgurita la unua en nia lando bareliefo de d-ro Zamenhof.

Ni sciigas al vi, ke la unua bareliefo de Zamenhof troviĝas en urbo Sevlievo. Ĝi estis metita sur la samnoma strato, same en decembro, sed en la jaro 1959, okaze de la centa datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof. La bareliefon faris la skulptisto Cvetan Mandev, nia samurbano, same senrekompence.

Kiel pruvon ni sendas foton de la bareliefo.

Societo „Fratiga Stelo“, Sevlievo.

Noto de la redakcio:

Samtempe Petko Arnaudov sendis al ni kopion de sia letero al la esperantistoj en Sevlievo. Interalie en ĝi oni legas: „Via demento nin ne ĉagrenas. Male — ĝi nin ĝojigas. Ni ne bedaŭros, se evidentigos, ke nia bareliefo estas tria, ĉar kiom pli da bareliefoj de Zamenhof ornamas niajn stratojn, des pli bone.“

## KIE TROVIGAS LA ORIGINALO?

Estimata Redaktoro,

En „Bulgara Esperantisto“ 7/1987, p. 3, vi publikigas leteron de Zamenhof al Schleyer. La enkondukita komento vekas ĉe la neinformita leganto la impreson, kvazaŭ ĵus oni trovis ĉi leteron.

Efektive mi mem aperigis ĝin kun komento unua foje en 1976 en la revuo „Horizonto“, omage al Prof. Waringhien, tiam 75-jara. Tie troviĝas ankaŭ faksimilo de la plena teksto. La originalo de la letero troviĝas en mia arkivo. Mi estus danka, se ĉi informojn vi povus doni al viaj legantoj.

Kun sinceraj salutoj,

Reinhard HAUPENTHAL

Noto de la redakcio: La redakcio kore dankas al akademiano Hauptenthal pro liaj klarigoj.

## LEGINDA LIBRO

Temas pri la libro de nia fama aktorino Belka Beleva — „Teatro sen lingva bariero. Travivitaj rememoroj“. Mi ĵus finlegis ĝin kaj ĉio en ĝi kortuŝis min. Tiel belege, tiel verve ŝi rakontas al la legantoj pri siaj travivaĵoj sur la scenejo kaj pri siaj renkontiĝoj kun gesamideanoj el diversaj landoj, ke mi eksentis deziron dividi mian emocion kun tiuj, kiuj ankoraŭ ĝin ne legis.

Dank' al tiu rava libro, akompanate de la aŭtorino kaj ŝiaj gekolegoj, mi „traveturis“ grandan parton de la mondo. Mi eksciis multe

pri la spektakloj de BET, kvankam kelkajn el ili mi havis la feliĉon mem spektii.

Miaopinie estus bone, se tiun libron povus tralegi ankaŭ neesperantistoj, se ĝi aperus ankaŭ bulgaringve. Mi dankas al B. Beleva kaj A. Anev pro la granda ĝojo, kiun ili donacis al mi.

Maria ANGELKOVA, Godeĉ

## PER PROPRA ABONMANTIERO

En revuo „Bulgara Esperantisto“, n-ro 9/87, mi tralegis la informon „Nova societo“ de Grigor Bojaĝiev, en kiu oni povis legi ke en nia logloka sistemo Rakitovo estas fondita nova E-societo „Cepina“. Krom tio, en la ĉefartikolo de la sama numero, titolita „Nia verda tabulo“, oni same mencias nian societon „Cepina“ informante, ke en vilaĝo Kostandovo, distrikto de Pazargik, estas 22 abonantoj de „Bulgara Esperantisto“. Ĉio ĉi estas vero, kaj mi estas tre dankema pro via bonvolemo sciigi la legantojn pri nia laboro kaj pri niaj sukcesoj.

Tio devigos nin estonte labori ankoraŭ pli bone.

Georgi LEBANOV,  
sekretario de societo „Cepina“

